

1975 majo

68-a jaro

n-ro 833 (5)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



La Internacia Jaro de la Virino

Vi trovos

ke iom post iom fariĝas preskaŭ amuzaj niaj daŭraj promesoj sur ĉi tiu loko en la revuo, ke la sekvanta numero aperos, se ne tute ĝustatempe, tiam almenaŭ pli frue. Nu, tio ial tamen ne okazas! Oni povas fari sian eblon, sed oni ne povas superi siajn eblojn, krom en fabeloj kaj aliaj rakontoj pri herooj. Triste, sed ni, kiuj produktas ĉi tiun revuon, ne apartenas al heroaj specioj. Se ni foje ankaŭ aperdate ĝisdatigos ĉi tiun revuon, vi tion mem rimarkos, kaj intertempe ni promesas ne plu faradi al vi amuzajn kaj neplenumebajn promesojn. Pretere dirite, ni neniam sukcesis kompreni la homojn, kiuj simple pro malfrua aperdato pretas kondamni la revuon kaj preteratenti, ke ankaŭ la malfruo havas siajn avantaĝojn. Ekzemple, en ĉi tiu numero vi povos legi pri aferoj, kiuj okazis en la lastaj tagoj de aprilo, kion vi ja legus eventuale nur en nia junia numero, se hazarde la revuo aperadus ĝustatempe. Estas vero, ke ni malfruas, sed ne estas vero, ke vi pro tiu malfruado legas neaktualan revuon. Jes, jes tutcerte — vi havas viajn rajtojn rilate la ĝustatempan ricevadon de la revuo, sed . . . Cetere, estas tute bele, ke vi daŭre plendas pro la malfruiĝoj, ĉar tio por ni signifas, ke vi scivolas pri la revuo, ke iel ĝi mankas al vi, ke vi eble eĉ ĝuas la legadon. Nu, tiam — dankon pro la plendoj! Restas al ni ankoraŭ esperi, ke vi ankaŭ en ĉi tiu numero trovos interesajn kontribuojn, kiuj ne nur satigos vian novajmalsaton kaj kontentigos vian scivolemon, sed instigos vin plue aktivadi por la celo al kiu ni ĉiuj (jes, ankaŭ ni!) strebas. Ĝis junio!

Enhavo

- 81 La 60a UK: Sub protekto de la ĉefministro, Eksteraj rilatoj de UEA: Vaste kaj intense (sm)
- 83 La aprila kunsido de la Estraro: Homogeneco laborkondiĉa (S. Milojević), La nepo de d-ro Zamenhof vizitis la Centran Oficejon, Belartaj Konkursoj 1975: Kiu juĝas?
- 85 Lingvistika simpozio en Zagreb: Haste, sed bone (Marinko Gjivoje)
- 86 La antverpenaj vintraj cikloj: Je la dispono de la publiko. . . (sm)
- 87 Lingvaj rajtoj: Usono, Italio, Togolando, Jugoslavio
- 88 Leterkesto
- 89 Internacia Somera Universitato: Tradicio en freŝa vesto
- 90 Recenzoj ("Planktono kaj mara produktado", "Dekopo de Afke")
- 91 Laste aperis . . . , Antaŭ 50 jaroj
- 92 Kalendaro: Riĉa elekto de aranĝoj
- 94 TEJO-paĝo: Regiona agado de TEJO — kien? (Juan Azcuénaga), Fredericia por idilio
- 95 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 60a Universala Kongreso
- 96 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 99 Oficiala informilo, Esperanto en radio
- 100 Nekrologoj (A. Bárochová, J.G. Fowler, H. Kervers, E. Scharff), Anoncetoj

La kovrilo

Ankaŭ la Esperanto-movado per siaj propraj aktivecoj markas la Internacian Jaron de la Virino, kiun proklamis la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. En apartaj kontribuoj en ĉi tiu numero de la revuo vi legos pri la entreprenoj de UEA okaze de la Jaro. Nia kovrila foto venis el la ĉefurbo de Bulgario, kie la 8an de marto s-ro Genčo Genĉev, prezidanto de la jurista sekcio de la Bulgara Esperantista Asocio, transdonis florbukedon kaj Esperantan eldonon de "Dia Komedio" al s-ino Svetla Daskalova, bulgara justicministro.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H.R.

Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne Pa. 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Raclawicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 7412.

Sub protekto de la ĉefministro

La 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago okazos sub la alta protekto de la ĉefministro de Danlando, s-ro Anker Jørgensen (sur la apuda foto). La oficejo de la ĉefministro ĵus informis pri tio la Lokan Kongresan Komitaton de la 60a UK. Kiel konate, la ĉi-jara Kongreso estas la tria UK, kiu dum la lastaj du jardekoj okazas en la dana ĉefurbo. Ankaŭ la du antaŭaj Universalaj Kongresoj en Kopenhago okazis sub la alta protekto de la tiamaj ĉefministroj de Danlando, s-ro H.C. Hansen (en 1956) kaj s-ro V. Kampmann (en 1962), kio sendube estas signo de la prestiĝo, kiun en la ĉi-jara kongreslando ĝuas la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado.



EKSTERAJ RILATOJ DE UEA:

Vaste kaj intense

UNU EL LA ĈEFAJ TRAJTOJ de la Esperanto-movado post la Dua Mondmilito estas la starigo de intensaj eksteraj ligoj kaj tre zorga kaj skrupula flegado de tiuj rilatoj. Neniu eĉ provas nei, ke UEA, kiel ĉefa reprezentanto de la organizita Movado, sian nunan prestiĝon grandparte ŝuldas ĝuste al siaj eksteraj rilatoj. La nuna Estraro de UEA plene konscias pri la neceso ne nur flegi la ĝisnunajn rilatojn, sed ankaŭ, se iel eble, vastigi kaj pliintensigi ilin. Se oni en nia revuo lastatempe malmulton legis pri tiuj temoj, tio neniel signifas, ke sur tiu kampo de la asocia agado mankas aktiveco; male — ĝi estas unu el la plej viglaj laborterenoj. Pro tiuj niaj legantoj, kiuj skribis al ni demandante "ĉu estas vero, ke UEA ne plu interesiĝas pri la konsultaj rilatoj kun Unesko", kaj pro aserto de landa Esperanto-periodaĵo, ke sur la kampo de la eksteraj rilatoj la nuna Estraro faris nenion, ni ĉi tie klopodas skizi lastatempajn entreprenojn en ĉi tiu labortereno.

Kiel statas la konsultaj rilatoj kun Unesko?

Estas vero, ke UEA ne reprezentigis en la 18a Ĝenerala Konferenco de Unesko fine de oktobro 1974 en Parizo. Tio ne okazis pro neglekto sed pro simpla maleblo post la retiriĝo de la antaŭa reprezentanto, s-ro Jean Thierry, rapide trovi novan kompetentan komisiiton.

Bedaŭrinda preteratento de nia revuo estas, ke ni ne notis la 20an datrevenon de la Montevidea Rezolucio, en decembro pasintjare. Tamen, ne necesis lasi nin fari tiun eraron por poste nin akuzi pro ĝi, eblis ankaŭ per ĝustatempa atentigo preventi, ke tiu eraro okazu. Sed, ni prefere diru kiel nun statas la aferoj.

Post plurmonataj klopodoj, la Komisiono de UEA pri Eksteraj Rilatoj, kiun gvidas d-ro Tonkin, kaj kies membroj estas s-roj Berceli, Leon-Smith, Schleicher, Simeonov kaj Uśpieński, sukcesis formi tutan grupon, kiu nun reprezentas la Asocion ĉe Unesko. La gvidanto de tiu grupo estas s-ro Emmanuel Chicot, kaj ĝiaj membroj: s-ro Roger Despiney, s-ro Marcel Duplan, s-ro James Fairbank, s-ino Jeanne-Marie Liouville-Cash kaj s-ro Gabriel Rougetet. Dum s-ro Chicot estas la oficiala reprezentanto de UEA ĉe Unesko, la aliaj kvin membroj de la grupo funkcias kiel liaj helpantoj kaj anstataŭantoj, ĉiu sekvanta difinitan aspekton de la agado de Unesko: edukado, scienco, kulturo, junularo kaj informado.

Estas aparte notinde, ke la prezidanto de UEA havis en la sidejo de Unesko en Parizo, la 9an de aprilo 1975, longan interparolon kun s-ro Pierre Le Harivel, direktoro de la Unesko-sekcio por la rilatoj kun la internaciaj neregistaraj organizaĵoj. Dum tiu interparolo, s-ro Le Harivel laŭdis la akuratecon de UEA en la ĝisnunaj rilatoj, sed menciis, ke la ĝisnunaj intervenoj de nia Asocio ofte estis iom unuflankaj, ĉar alirantaj la problemojn nur el la vidpunkto de la Esperanto-movado. Estas sendube, ke la nova maniero de nia reprezentigo en la monda organizaĵo — la grupo, kiu prizorgas niajn rilatojn kun Unesko — ebligos, ke la rilatoj inter tiu organizaĵo kaj UEA fariĝu pli intensaj kaj pli fruktodonaj, ol iam ajn antaŭe.

Reprezentigo ĉe la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj

Kiel rezulto de la konsultaj rilatoj de UEA kun Unesko, la Asocio estas en similaj rilatoj ankaŭ kun la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN. Ekde la estiĝo de tiuj rilatoj, la Asocion reprezentis ĉe la sidejo de UN en Nov-Jorko s-ro Mark Starr kaj s-ino Marian Newell-Lorie. Ili daŭrigas tiun laboron ankaŭ nun. Krom ke niaj reprezentantoj regule partoprenas ĉiusemajnajn kunsidojn de neregistaraj organizaĵoj en la sidejo de UN, ankaŭ la estrarano de UEA pri la eksteraj rilatoj, d-ro Tonkin, estas en regulaj skribaj kontaktoj kun la sidejo de la monda organizaĵo, jam plurfoje vizitis ĝin por diskutoj kun gravaj funkciuloj kaj en marto ĉi-jare ankaŭ li partoprenis la jaran konferencon de la neregistaraj organizaĵoj en Nov-Jorko.

Granda parto de nia kunlaboro kun UN kaj Unesko ligiĝas nuntempe al la partopreno de UEA en la Internacia Jaro de la Virino, proklamita de la Ĝenerala Asembleo de UN, kaj al la Jardeko de la Aktivado por kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion. La Estraro de UEA formis apartan Organizan Komitaton por la Internacia Jaro de la Virino. La komitaton gvidas s-ino Elsbeth Bormann (FRG), kaj ĝiaj membroj estas: s-ino Ursula Grattapaglia (Brazilo), s-ino Yukiko Isobe (Japanio), s-ino Elizabeta Pallós (Hungario) kaj s-ro Ib Schleicher (Danlando). Krome, interkonsente kun landaj asocioj kaj kun la fakdelegitoj de UEA pri virinaj aferoj, en 17 landoj estas nomitaj landaj komisiitoj por IJV kaj niaj apartaj ŝarĝitoj pri la Jaro laboras ĉe la sidejoj de UN (s-ro Starr) kaj Unesko (s-ino Liouville-Cash). En la ĉefa evento de la Jaro, monda konferenco, kiu okazos inter la 19a de junio kaj la 2a de julio 1975 en la ĉefurbo de Meksikio, nian Asocion reprezentos s-ro Mark Starr kaj prof. Maria Luisa S. de Bancalari (Meksikio). Kiel ni jam plurfoje anoncis, ankaŭ la 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago traktos kiel ĉeftemon la socian pozicion de la virino. Rilate la Jardekon de kontraŭrasisma aktivado, pri kiu la Komitato de UEA en Hamburgo akceptis apartan laborplanon (v. nian revuon, majo 1974), necesas atentigi, ke la ĉi-jara sesio de la Internacia Somera Universitato (v. la paĝon 89) ligas iujn siajn temojn al la Jardeko. Krome, nia revuo, kiel la asocia organo, en preskaŭ ĉiu numero dediĉas sufiĉe da spaco al temoj, kiuj rilatas la lingvan problemon ĝenerale kaj la lingvan diskriminacion aparte. Tiurilate necesas aparte elstarigi *Kontakto*-n, la revuon de la junulara sekcio de UEA, kies ĉiu numero donas abundan studmaterialon pri la lingvaj rajtoj kaj diskriminacio. Krome, la junulara sekcio de UEA ankaŭ ĉi-jare planas seminariojn kaj aliajn renkontiĝojn, kiuj traktos temojn ligitajn al la Jardeko.

Klopodoj plivastigi la eksterajn rilatojn de UEA

La nunaj gvidorganoj de UEA ne nur klopodas daŭrigi kaj flegi ĉiujn ĝis nun starigitajn eksterajn rilatojn, sed ili faras grandan streĉon ligi novajn kontaktojn kaj

evoluigi ilin ĝis grado, kiu kongruas kun la Statuto de la Asocio, kaj kiu povus kontribui al plifirmigo de la eksteraj pozicioj de UEA kaj ĝia ekstermovada prestiĝo. Tiurilate estas aparte menciindaj rilatoj, kiuj okazas pere de la Eŭropa Esperanto-Centro, kun kiu UEA intime kunlaboras ankaŭ pro la fakto, ke la gvidanto de la Centro, d-ro Pol Denoël, samtempe estas ankaŭ estrarano de UEA. La Centro lanĉis apartan kampanjon, kiun UEA forte subtenis, por certigi la necesan nombron de abonantoj al *Eŭropa dokumentaro*, kiu nun daŭrigas sian aperadon en Esperanto.



S-ro Mark Starr kaj prof. Maria Luisa S. de Bancalari, kiuj reprezentos UEA en la monda konferenco okaze de la Internacia Jaro de la Virino

Necesus tute aparta artikolo — kaj ni esperas baldaŭ publikigi ĝin — por prezenti tutan aron da novaĵoj pri la parlamentaj kampanjoj, kiuj tre sukcese evoluas en pluraj landoj. La Komisiono de UEA pri Eksteraj Rilatoj klopodas trovi manieron por kunordigi tiujn kampanjojn. Io simila okazas ankaŭ rilate la agadon ĉe la diversaj politikaj partioj, kiu aparte viglas en Italio, Danlando, Svedio, FR Germanio, Nederlando kaj Aŭstrio. Menciindas ankaŭ kontaktoj kun internacia registara instanco, la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, en kies organo *Américas* antaŭ kelkaj monatoj aperis plurpaĝa artikolo pri Esperanto, verkita de s-ro Alfonso Henriques Correa.

Apartan atenton de la Komisiono altiris la intervjuo de s-ro Sándor Gáspár, ĉefsekretario de la hungaraj sindikatoj. Oni ankoraŭ serioze studas la proponojn de s-ro Gáspár kaj — ankaŭ tio apartenas al eksteraj rilatoj — la prezidanto de UEA, la 9an de aprilo en Parizo, renkontiĝis kun s-ro Petro Lévy, prezidanto de SAT, por diskuti ĝenerale la rilatojn inter UEA kaj SAT, kaj aparte, — por esplori eblecojn de kunordigita agado en sindikataj medioj, interalie lige al la intervjuo de s-ro Gáspár.

Kvankam ni nur supraĵe skizis kelkajn aktivecojn en la kampo de la eksteraj rilatoj, kelkajn ni nur pretere menciis, kaj aliajn eĉ ne sukcesis mencii, sendube estas klare, ke la Asocio dum la lasta duonjaro flegas pli intensajn eksterajn rilatojn, ol ĝi faris iam ajn antaŭe en sia lastatempa historio. sm

Kiu juĝas?

NI JAM PLURFOJE skribis pri la ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj de UEA, kiuj festos sian 25-jaran jubileon dum la 60a (ankaŭ jubilea) Universala Kongreso en Kopenhago. Okazis, tamen, ke ni iel preteratentis publikigi la nomojn de la membroj de la nova juĝkomisiono, kiu konsistas el: s-ro Vilmos Benczik (Hungario), s-ro Torben Kehlet (Danlando), mag. Edwin de Kock (Sud-Afriko), s-ro Miyamoto masao (Japanio), d-ro Carlo Minnaja (Italio), s-ro Johan H. Rosbach (Norvegio), s-ro Ivo Rotkvić (Jugoslavio), d-ro Pierre L. Ullman (Usono) kaj s-ino Eli Urbanová (Ĉeĥoslovakio). Kiel konate, la prezidanto de la juĝkomisiono estas s-ro Baldur Ragnarsson (Islando), kaj la sekretario s-ro Alec Venture (Britio). La limdato por la literaturaj branĉoj de la ĉi-jaraj Konkursoj pasis jam fine de marto kaj la juĝkomisionanoj nun estas plene okupitaj per la aprezado de la konkursaĵoj. Ripozas nur s-ro Kehlet, kiu gvidos apartan juĝkomisioneton por la branĉo FOTOGRAFIO, kiu ankoraŭ akceptas konkursaĵojn, sendendajn antaŭ la 1-a de julio 1975 rekte al la adreso de la LKK en Kopenhago. Pri aliaj detaloj bv. vidi nian martan numeron p. 46.

Homogeneco laborkondiĉa

EN SIA KUTIMA KUNSIDO dum ĉi tiu parto de la jaro, inter la 11a kaj la 13a de aprilo en Rotterdam, la Estraro de UEA denove estis komplete, la kunsidon ĉeestis ĉiuj ok estraranoj, la direktoro kaj la vicdirektoro de la C.O. de UEA, kaj parte ankaŭ la librotenisto de la Asocio. Elstarigante jam en la unua frazo de ĉi tiu raporto la kompletecon de la Estraro, ni volas, ke vi legu ĝin ankaŭ kiel sinonimon de homogeneco, kiu estis grava trajto jam de la januara kunsido, sed dum la aprila renkontiĝo de la Estraro de UEA ĝi trudiĝis kiel ĉeftrajto. Konantoj de pli frua situacio interne de UEA, de la atmosfero en la gvidaj organoj de la Asocio, facile konsentas, ke havi homogenan estraron estas la unua kondiĉo por havi laborkapablan estraron. Tion la nuna Estraro atingis, kaj ni estas pretaj konsideri la homogenecon de la nuna gvidorgano de UEA unu el la ĉefaj sukcesoj en la klopodoj sanigi ne nur financojn, sed ankaŭ internajn rilatojn en la Asocio. Necesas ankoraŭ menci, ke oni tiun homogenecon ŝuldas egale al ĉiuj estraranoj, al la preteco de ĉiu unuopa el ili fojfoje cedi se necese, transpreni parton de la kolektivaj laboroj kaj, sekve, ankaŭ respondeco. Sed, aliflanke, tamen povas okazi, ke oni la unuecon de la nuna Estraro antaŭ ĉio ŝuldas al tre klara distingo de la temoj, kiuj jes estas demandoj pri kiuj devas okupiĝi estraro de monda organizaĵo, disde la aferoj, kiuj esence estas personaj konfliktoj kaj kiuj tio restu eĉ kiam temas pri la personeco de la prezidanto de UEA. La nuna Estraro kribras antaŭ la kunsidoj sian tagordon tiel, ke en ĝi ne restas loko por aferoj, kiuj ne estas demando koncernanta la Asocion kiel tuton. Kaj, se ni jam aŭdacas fari konkludon, ni diru klare: tio estas la ĝusta vojo! Raportante siatempe pri la januara kunsido de la Estraro (v. la februaran numeron, p. 23), ni jam emfa-

zis, ke la financa problemaro dominis tiun kunsidon. Tute same okazis ankaŭ kun la aprila kunsido: la financoj pli—malpli forrabis preskaŭ du el la tri kunsidaj tagoj. Enkondukante la martan artikolon pri la financa situacio (p. 43), ni substrekis, ke la Estraro de UEA deklaris veran militon al la financaj zorgoj de la Asocio. La aprila kunsido konfirmis, ke tiu milito ankoraŭ daŭras kaj eble eĉ ne jam atingis sian kulminon. Kaj, oni militas spite al tiuj, kiuj en ĉiu klopodo ŝpari vidas nur "tranĉon de gravaj aktivecoj". Jes, oni efektive tranĉis, tranĉas kaj eble ankoraŭ tranĉos ĉie en la elspezoj, kie tio iel ajn estas ebla. Ja, estas pli bone havi ĉi-jare unuvoluman Jarlibron, ol resti ĉe du volumoj kaj venontjare tute ne havi Jarlibron. Povas okazi, ke vi en la dua parto de ĉi tiu jaro subite ricevus plian duoblan numeron de nia revuo, malgraŭ la profunda konscio kaj ĉiuj eblaj konsideroj pri la graveco de la asocia organo. Denove, — estas pli bone ĉi-jare ricevi nur 10 aŭ 9 numerojn de la revuo, ol en la venonta jaro resti tute sen revuo. La grandega plimulto de niaj legantoj komprenos, ke ĉi tie ne temas pri ia abstrakta kaprico de la Estraro de UEA, sed pri realeca takso de la aktualaj financaj ebloj kaj malebloj, ĉio ĉi liberigita de pensoj pri pompo kaj prestiĝaj agoj, kiuj en antaŭaj kazoj kelkfoje superis la efektivajn financajn eblojn de la Asocio.

La aprila kunsido jam montris, ke la Estraro en sia milito kontraŭ la financaj malfacilaĵoj de UEA notis la unuajn venkojn, Kvankam por la pasinta jaro malmulto estis ankoraŭ post la Hamburga Kongreso

LA NEPO DE D-RO ZAMENHOF VIZITIS LA CENTRAN OFICEJON



ING. LUDOVIKO ZALESKI-ZAMENHOF, nepo de la aŭtoro de Esperanto, meze de aprilo 1975 vizitis kun sia edzino la Centran Oficejon de UEA en Rotterdam. Ing. Zaleski-Zamenhof, kiu cetere estas dumviva membro de UEA, kun granda intereso trarigardis la Oficejon kaj ĉe la adiaŭo menciis, ke povas okazi, ke liaj ĉi-someraj planoj inkluzivos ankaŭ la partoprenon en la 60a Universala Kongreso en Kopenhago.

ŝanĝebla rilate la financojn, per rigoraj ŝparoj kaj efikaj tranĉoj en la elspezoj, oni sukcesis limigi la deficiton por la jaro 1974 al ĉ. 39 000 guldenoj, kio ja estas je 20 000 guldenoj malpli granda defcito, ol en la jaro 1973. Krome, la defcito de 1974 tuŝas la kapitalon de la Asocio nur per 3 000 guldenoj kaj ankaŭ tiurilate estas almenaŭ trifoje malpli malbona rezulto, ol en 1973. Efektivaj rezultoj de la realeca aliro al la financaj problemoj de UEA klare montriĝos en ĉi tiu jaro, ĉar ĝian buĝeton preparis kaj efektivigas la nuna Estraro. Jam nun menciindas, ke tiu buĝeto ankaŭ en la aprila kunsido denove estas reviziita, kio estis ĝia tria aŭ kvara revizio. Finfine, dum la aprila kunsido la Estraro sukcesis produkti sendeficitan buĝeton por la jaro 1975 kaj oni ne nur havas grandajn esperojn, sed oni faras enormajn streĉojn por ke la jaro efektive finiĝu sendeficite. Serĉante kompromison pri la financaj rezultoj de la 58a UK en Beograd, la Estraro kredas, ke ĝi trovis definitivon solvon kaj ĝi en Kopenhago proponos al la Komitato la finkalkulon pri la Beograda Kongreso. La Estraro diskutis ankaŭ kelkajn aliajn financajn detalojn kaj faris decidojn, al kiuj ni revenos en nia junia numero.

Ni jam en la februara numero informis, ke la Estraro decidis pri la 61a UK en 1976, en Ateno. Nun estas fiksitaj ankaŭ ĝiaj datoj: de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto 1976. Definitiviĝis ankaŭ la decido pri la 62a UK en Reykjavik, inter la 30a de julio kaj la 6a de aŭgusto 1977. Oni reelektis por plia deĵorperiodo la estraron de la Instituto Hodler '68 (d-ro W. Bormann, s-ro E. HaverSchmidt kaj s-ro G. Maertens). Grandan parton de la kunsida tempo forprenis la definitivigo de la kongresa programo por Kopenhago, pri kio vi povas legi sur la paĝoj 89 kaj 95. Eksteraj rilatoj de UEA estis atente konsiderataj, sed ankaŭ tiu temo okupas apartan spacon en ĉi tiu numero de la revuo. Pri pluraj aliaj temoj traktitaj dum la kunsido ni informos vin en niaj sekvantaj numeroj.

Kun aparta ĝojo la Estraro notis la multnombrian aliĝadon al la "Societo Zamenhof" kaj regulan alfluron de malavaraĵoj donacoj (v. la paĝon 99). Tio estas valora signo pri la fido, kiun la membraro montras ankaŭ al la nuna Estraro de UEA.

S. Milojević



Intensa tritaga kunsidado de la Estraro de UEA, meze de aprilo en Rotterdam, ne sufiĉis por fintrakti la tagordon de 78 eroj. Sur niaj fotoj (de supre): s-ro S. Świstak kaj d-ro H.R. Tonkin, prof. C. Støp-Bowitz kaj d-ro W. Bormann, s-ro E.J. Woessink kaj d-rino F. Szabó-Felső, s-ro E.L.M. Wensing kaj la direktoro de la C.O., d-ro V. Sadler. (Sur la fotoj mankas d-ro P. Denoël, ĉar li ne estis ankoraŭ alveninta kiam la kunsidon vizitis nia fotografisto).

Haste, sed bone

Kvankam iom malfrue anoncita kaj por tiuspeca aranĝo haste organizita, la Internacia Lingvistika Simpozio en Zagreb (Jugoslavio) ricevis favorajn recenzojn kaj ampleksajn raportojn ankaŭ en la jugoslaviaj gazetaroj, radio kaj televido. La aranĝon financis ekstermovada institucio, kaj la Internacia Kultura Servo (la organizanto) aldonis al sia multflanke senlaca agado (pup teatra festivalo, eldona aktiveco ktp.) plian dimension.

EN KUMROVEC, proksime de Zagreb, okazis de la 4a ĝis la 6a de aprilo 1975 Internacia Lingvistika Simpozio en kiu prelegis lingvistoj, komputistoj kaj tradukistoj el kvin landoj. La ĉeftemo de la Simpozio estis: "Esperanto kiel lingvistika bazo de universala gramatiko kaj de meta-lingvo kaj kiel universala lingva fenomeno". La organizanto estis Internacia Kultura Servo el Zagreb, la aŭspicianto TEJO; la Simpozion financis la Respublika Konsilantaro por Scienca Laboro, en la kadro de la aktivecoj de la Komitato por Kunordigo de Scienco kaj Tekniko en SFR Jugoslavio. Jen estis la unua okazo, ke oni en Jugoslavio pritraktis la fenomenon de la Internacia Lingvo flanke de diversaj specialistoj kaj el sciencaj vidpunktoj. La Simpozio sukcesis laŭ ĉiuj aspektoj kaj estus treege utile, se realiĝos plano, ke la referaĵoj kaj resumoj de la diskutoj baldaŭ aperu libroforme (dulingve). La referaĵoj estis prezentitaj aŭ en Esperanto aŭ nacilingve, kaj ĉio estis tradukata, same la viglaj diskutoj.

Unue ni prezentu la prelegantojn: prof. d-ro Helmar Frank, direktoro de Kibernetika Instituto Paderborn (FR Germanio), prof. d-ro Istvan Szerdahelyi, Universitato de Budapeŝto (Hungario), d-ro inĝ. Antal Münnich, komputisto el Budapeŝto (Hungario), s-ro Michel Duc Goninaz, profesoro ĉe Universitato de Aix-en-Provence (Francio), d-ro Dalibor Brozović, profesoro ĉe Filozofia Fakultato en Zadar (Jugoslavio), d-ro Zlatko Gorjan, tradukisto el Zagreb, honora prezidanto de Internacia Federacio de Tradukistoj, prof. Josip Vrančić, arthistoriisto el Zadar, s-ro Josip Velebit, emerita profesoro, tradukisto kaj verkisto el Zagreb, kaj s-ro Zlatko Tišljar, direktoro de Internacia Kultura Servo. Alvenis ankaŭ pluraj referaĵoj de fakuloj, kiuj persone ne ĉeestis la Simpozion.

La Simpozion partoprenis ankaŭ neesperantistoj, ekz. la konataj lingvistoj d-ro Antun Šojat kaj d-ro Milan Moguš, ambaŭ de Universitato en Zagreb, kaj konataj esperantistoj: akademiano Ivo Rotkvić, Tibor Sekelj, d-ro Peter Zlatnar, Marinko Gjivoje k.a., kiuj ofte intervenis en la diskutoj.

La prelegoj en la Simpozio traktis la Internacian Lingvon laŭ pedagogia kaj lingvistika (morfologia, seman-

tika kaj leksikologia) aspektoj. Prof. Helmar Frank en sia malferma referaĵo prezentis tezojn por eŭropa lingvopolitiko.

D-ro Istvan Szerdahelyi parolis pri Esperanto kiel lerneja studobjekto, pri ĝiaj didaktika kaj pedagogia valoroj, surbaze de la spertoj akiritaj dum la 3-jara eksperimenta instruado al 900 infanoj en kvin diverslingvaj landoj (Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio).

Aparte valora estis la argumentita prelego de la jugoslavia lingvisto (iam tre aktiva esperantisto) d-ro Dalibor Brozović, kiu parolis pri la loko de Esperanto en la lingva tipologio. Surbaze de du diversaj metodoj (tiuj de la usona lingvisto Greenberg kaj de la soveta lingvosciencisto Roĵdestvenskij), mezurante fonetikajn kaj morfologiajn valorojn de Esperanto kaj komparante ilin kun 16 aliaj lingvoj el diversaj lingvaj grupoj, d-ro Brozović konstatis, ke Esperanto laŭ sia strukturo okupas lokon de meza lingvo inter la aliaj lingvoj kaj estas plej proksima al la turkaj lingvoj, alproksimiĝante ankaŭ al la hind-eŭropaj lingvoj. La temon "Semantika modelo de Esperanto-morfemoj, iliaj distribuoj kaj valentoj" pritraktis d-ro Szerdahelyi, dum prof. Michel Duc Goninaz okupiĝis pri la temo "Monemologio kaj morfologio en Esperanto".

En sia prelego "Kleriga teknologio kaj planlingva instruado" d-ro Frank prezentis la sukcesojn atingitajn en la Kibernetika Instituto Paderborn per la uzo de la aparato "Robimat II" en la instruado de la lingvo. Pri kelkaj planlingvaj problemoj el la vidpunkto de komputisto kaj pri la apliko de Esperanto ĉe la plej aktualaj teknikaj atingiĝoj parolis d-ro Antal Münnich, kunlaboranto de la Hungara Scienca Akademio, montrante vastajn eblecojn de komputila prilaboro de informoj kaj avantaĝojn en la solvado de specifaĵoj ĉe problemoj matematike esprimeblaj. Li prezentis la funkciadon de la programlingvo "Progreso I" por komputila prilaboro de Esperantaj tekstoj.

Estis tralegita ankaŭ la referaĵo "Esperanto — ĉu scenlingvo?" de la teatra recenzisto Milan Čečuk el Zagreb. Prof. Josip Velebit prelegis pri la monda Esperanta poezio kaj Esperanto-poezio en Jugoslavio, donante ekzemplojn per tradukoj de li mem faritaj. D-ro Zlatko Gorjan traktis la temon "Problemoj de la nuntempa tradukado", dum prof. Josip Vrančić parolis pri "Artfaka Esperanta terminaro"; Zlatko Tišljar prezentis la temon "Elementoj de Esperanta gramatiko kiel modelo de universala gramatiko laŭ analogie kompara metodo".

La partoprenintoj tre flate esprimiĝis pri la medio en kiu okazis la Simpozio, pri la organizo mem, kaj emfazis deziron, ke samloke ĉiujare okazu simila simpozio, sed ĝi laboru en pluraj sekcioj, kiuj aparte okupiĝos ekz. pri ĝeneralaj lingvistikaj temoj, komputiko, tradukarto k.s., kaj kiel prelegantoj estu invitetaj ankaŭ aliaj samfakanoj. La gazetaroj, radio kaj televido dediĉis al la Simpozio merititan atenton.

Marinko Gjivoje

Je la dispono de la publiko....

La lokaj Esperanto-societoj kaj kluboj estas unu el tiuj esencaj trajtoj de la Movado, kiuj speciale en la postmilita periodo ne ricevas merititan atenton kaj ofte prezentiĝas kiel fosilioj el la unuaj jardekoj de la Internacia Lingvo. Oni emas forgesi, ke minimume 90 procentoj de la movadaj aktivuloj kaj aktivaj uzantoj de la lingvo trejniĝis ĝuste en tiuj lokaj grupoj, sen kiuj la hodiaŭa Movado apenaŭ ekzistus. Pruvon, ke la epoko de la lokaj societoj ankoraŭ ne pasis, ke ili ankoraŭ kapablas ludi kaj kelkloke ludas sian esencan rolon, liveras la ekzemplo de Antverpeno en Belgio, kie la loka societo trovis modernan kaj prestiĝan formulon por sia agado.

"LA MALPLI JUNA GENERACIO certe memoras la nomojn Schoofs, Istace, Van der Biest, Le Beck kaj Tondeur, sed por la juna generacio tiuj nomoj estas nebulecaj aŭ eĉ nekonataj. Tamen, estis ili tiuj, kiuj fondis en 1907 societeton nomitan 'La Verda Stelo'... kun la celo: 'Meti la studadon de la lingvo Esperanto je la dispono de la publiko'...". Paradoxse, sed estis ĝuste la reprezentanto de tiu juna generacio, s-ro Jo Haazen, tiama prezidanto de la Reĝa Antverpena Esperanto-Grupo "La Verda Stelo", tiu, kiu atentigis pri la daŭra aktualeco de la moto el la komenco de ĉi tiu jarcento. Li faris tion en la inaŭgura parolado al la 2a Vintra Ciklo, Antverpeno 1974/75. S-ro Haazen, kiu kun aliaj junaj grupanoj el Antverpeno iniciatis la ciklojn, tiufoje diris ankaŭ jenon: "Kvankam bonaj motivoj havas kvazaŭ eternan valoron, necesas de tempo al tempo revizii ilian aplikadon...".

Kaj, pri kio fakte temas? Kiaj cikloj? Kia revizio de malnovaj motoj? Kiu organizas? Por kiu? Kiumaniere?

Ĉio sonas iom pompe, kiel eĉ konvenas al la grupo portanta reĝan epiteton en sia nomo. Sur koloraj afiŝoj, kiuj dum la lastaj du vintroj ornamis afiŝtabulojn de Antverpeno, oni povis legi: "Organizata de Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun Unesko) kaj la Reĝa Esperanto-Grupo 'La Verda Stelo' en Antverpeno, sub la aŭspicioj de la Ministro pri nederlanda kulturo kaj flandraj aferoj kaj de la Unuiĝo de flandraj kulturasocioj en Antverpeno...".

— Vintra Esperanto-Ciklo 1973/74, ... Vintra Esperanto-Ciklo 1974/75. Serio de altnivelaj prelegoj kun internacia prelegantaro, traktinta temojn, kiuj vekas intereson ankaŭ ekster la Movado. En la 1-a Vintra Ciklo prelegis: d-ro J.C. Wells, Londono (Lingvo kaj eŭropaj problemoj), s-ro J. Thierry, Parizo (Evoluaj paŝoj de la Esperanta literaturo), d-ro E. Frederickx, Antverpeno (Simileco kaj diverseco en la lingvaro), s-ro S. Aarse, Amsterdamo (Lingvo kaj realo), d-ro P. Denoël, Lieĝo (Stranga malsano: la toksoplazmozo). La 2a Vintra Ciklo, de novembro 1974 ĝis marto 1975, alportis jenajn prelegojn: La romano en la naciaj lingvoj kaj en Esperanto (f-ino A.J. Middelkoop, Amsterdamo), La historio de Eŭropo (s-ro M. Ries, Luksemburgo), La spirito de la Renesanco (s-ro F.



Jo Haazen: La agado de la lokaj grupoj estas esence grava.

Roose, Bruĝo), La homo en la horoskopo (s-ro L. de Marré, Antverpeno), Kulturaj impresoj de Danlando (d-ro E. Svane, Kopenhago).

La prelegojn, kiuj okazis en reprezentaj salonoj disponigitaj de la urbo, meznombre ĉeestis ĉ. 75 aŭskultantoj. La ŝtataj kaj urbaj aŭtoritatoj montriĝis tre helpemaj finance kaj morale. Ĉio kune — prestiĝa entrepreno, bonege konceptita, tre sukcese realigita kaj aklame akceptita de la publiko.

Kompreneble, necesis amaso da preparlaboroj, kiujn grandparte plenumis la juna sekretariino de la antverpena grupo, f-ino Lutgarde Kenis. Unu el la ĉefaj problemoj kun kiuj luktis la organizantoj de la antverpenaj cikloj estis: kiel trovi fake kaj lingve kompetentajn prelegantojn.

Fine, kaŝa emo de la antverpenaj organizantoj estis per siaj prelegserioj "rompi la teman izolitecon de la tradiciaj Esperanto-aranĝoj kaj eviti tipe esperantismajn ŝovinismaĵojn". Prave, ke oni ĝuste tiel difinas la oftan emon de esperantistoj nur papage ripetadi sloganojn pri la beleco de "nia lingvo" kaj utileco de "nia afero", ignorante la ĉirkaŭan mondon kaj ĝian evoluon.

sm

Lingvaj rajtoj

Usono:

HONORA LEGIO KAJ ELEKTOPROCEZO

NEW YORK TIMES de la 18a de aprilo ĉi-jare informas, ke la franca ambasadoro en Usono antaŭ nelonge vizitis la ŝtaton Luiziano por transdoni la Honoran Legion al James Domengeaux, kiun la franca registaro distingas per tiu ordeno pro lia kampanjo "La franca en Luiziano", kies rezulto estas la oficialigo de la franca kiel la dua lingvo de Luiziano. La franca registaro subtenis la kampanjon de s-ro Domengeaux (juristo kaj eksa parlamentano) per, interalie, sendado de francaj instruistoj al tiu usona ŝtato. Momente en Luiziano laboras 200 francaj instruistoj kaj nombro de lokaj instruistoj estas trejnata en Luiziano kaj en Francio por poste zorgi pri la instruado de la franca.

La sama numero de *New York Times* raportas, ke subkomitato en la Kongreso (usona parlamento) voĉdonis favore por "aldono de Alasko kaj Teksaso al la ses sudaj ŝtatoj plene kovritaj per la Voĉdonrajta Akto el 1965". Simile, ekzistas propono subtenata de la Jura Subkomitato de la Kongreso, ke al 12 ŝtatoj, kiujn parte koncernas la menciita Akto, aldoniĝu pliaj kvin ŝtatoj de Usono. Klarigcele necesas aldoni, ke la Voĉdonrajta Akto el 1965 unuavice celis la usonajn negrojn kaj ilian partoprenon en la elektoprocezo, sed intertempaj esploroj pruvis, ke ankaŭ aliaj etnaj kaj lingvaj minoritatoj en Usono ofte restas flanke de tiu procezo. Nun preparata amendo al la Akto emfazas, ke la Kongreso trovas la diskriminacion kontraŭ civitanoj de lingvaj minoritatoj "trapenetra kaj naci-skala". Samloke estas dirite ankaŭ: "La Kongreso plie trovas, ke, kie ŝtataj kaj lokaj aŭtoritatoj organizas la elektojn nur en la angla, civitanoj el lingvaj minoritatoj estas ekskluzivitaj el la partopreno en ĉi tiu elekto-procezo."

Italio:

ERARA TAKSO DE NOBELPREMIITO

VIVINTE 36 JAROJN en Usono, la itala judo E. Sergre, gajninto de la Nobelpremio por nuklea fiziko en la jaro 1959, antaŭ kelka tempo reiris por definitive loĝi en Italio. Oni akceptis pli-malpli specialan leĝon, kiu al prof. Sergre permesis denove lekcii en la Universitato de Romo, kie li ekinstruis komence de decembro 1974. Prof. Sergre atentigis siajn studentojn, ke multaj studlibroj, kiujn li preskribos, estos anglalingvaj, ĉar li klarigis: "Mi atendas, ke vi povas legi en la angla lingvo".

La brita gazeto *The Guardian Weekly*, kiu raportis pri la reveno de prof. Sergre, atentigas, ke la nombro de italoj, kiuj povas legi kaj skribi angle, malpliigas ĉiujare. Unu el la kaŭzoj, laŭ la brita gazeto, estas problemoj renkontataj en la klopodoj de italoj akiri

kompetentan anglalingvan infanprizorgantaron aŭ kvalifikitan instruiston de la angla. *The Guardian Weekly* lamentas, ke diference de la aliaj landoj de la Eŭropa Ekonomia Komunumo, en kiuj la angla lingvo fariĝis deviga fako ekde la unuaj lerneaj jaroj, la itala lerneja sistemo preskaŭ malebligas la studadon de fremda lingvo kiel parto de la ĝenerala edukado.

Nu, kion diros la brita gazeto, se la italaj lernejoj obstine malsekvas la ekzemplon de la aliaj EKK-landoj, kaj se iuj el tiuj landoj komencos imiti Italion rilate la devigan instruadon de la angla lingvo?

Togolando:

LA FRANCA FARIĜOS FREMDA LINGVO

KVANKAM en Togolando la franca ankoraŭ suverene regas, laŭ *Jeune Afrique* (1975-03-28), la tiea Supera Konsilantaro pri Klerigo akceptis rekomendon de komisiono pri edukreformo, starigita antaŭ pli ol kvin jaroj, kaj decidis, ke la indiĝenaj lingvoj "ewe" kaj "kabiye" estu instruataj en la lernejoj. Provizore, la franca restos la instrulingvo, sed oni atendas, ke la du lokaj lingvoj baldaŭ anstataŭos ĝin en tiu funkcio kaj ĝi estonte rolos nur kiel instruata fremda lingvo.

Jugoslavio:

MINORITATOJ KAJ LEGITIMILOJ

DUM ĈI TIU MONATO en Jugoslavio komenciĝos anstataŭigo de la ĝisnunaj personaj legitimiloj per novaj dokumentoj samspecaj. Kvankam oni ankoraŭ ne scias kiel aspektos la novaj legitimiloj en la tuta lando, ĉar iliaj formo kaj enhavo apartenas al la kompetentecoj de ĉiu unuopa federacia ŝtato en Jugoslavio, laŭ ekzemplo de Serbio, kie dum majo komenciĝos la anstataŭigo, la afero montriĝas interesa ankaŭ el la lingva vidpunkto. La civitanoj de Serbio, apartenantaj al unu el la naciaj kaj lingvaj minoritatoj de tiu etne bunta parto de Jugoslavio, havos la rajton postuli kaj ricevi personan legitimilon en sia propra gepatra lingvo. Tiumaniere en la aŭtonoma regiono Kosovo, la novaj legitimiloj estos en la serbokroata kaj albana lingvoj, dum la civitanoj de la turka nacieco rajtos postuli, ke iliaj legitimiloj enhavu ankaŭ tekston en la turka lingvo. En la komunumoj apud la landlimo kun Bulgario, la tie vivantaj bulgaroj ricevos legitimilojn en la serbokroata kaj bulgara. En la aŭtonoma provinco Voĵvodino, etne la plej bunta regiono de Jugoslavio, la civitanoj povos elekti unu el ses variantoj de la nova legitimilo. Depende de sia nacieco ili rajtas havi legitimilojn en la serbokroata lingvo per cirila aŭ latina alfabeto, aŭ unu el la jenaj kvar dulingvaj legitimiloj: hungara-serbokroata, rumana-serbokroata, slovaka-serbokroata kaj rutena-serbokroata.

Kaj, kvankam Jugoslavio jam dum jaroj tre skrupule atentas siajn multnombrajn naciojn kaj naciajn minoritatojn kaj iliajn lingvaj rajtojn, eĉ la nova leĝo pri legitimiloj en Serbio sukcesis preteratenti kelkajn malmultnombrajn etnajn grupojn, kiuj vivas tie, ekzemple — ciganojn.

Ni danku al GEA

GERMANA ESPERANTO-ASOCIO donacis 500,- germanajn markojn al la Fondaĵo Azio-Afriko de UEA. La mono estos uzata, kiel la ceteraj sumoj alfluantaj en tiun Fondaĵon, por helpi per lerniloj kaj informa materialo esperantistojn loĝantajn en Afriko kaj Azio.

Tiu ĉi iniciato ne okazas unuafoje en la kadro de GEA, kiu jam pasintjare decidis atribui stipendion al SUK-partoprenanto el la tiel nomata Tria Mondo. Ni danku al GEA kaj atendu la duan landan asocion, kiu agos same.

D-ro Renato Corsetti,
komisiito de UEA por Regiona Agado

Distanciĝo

EN LA TEKSTO "Preparoj por la nova Statuto de UEA", publikigita en la marta *Esperanto*, du fojojn estas menciita mia nomo.

Estas vero, ke jam longe antaŭ la hamburgaj eventoj mi atentigis pri la neceso **plibonigi** kaj **pliprecizigi** kelkajn erojn en la nuna Statuto de UEA, sekve ankaŭ en diversaj regularoj. Miaj ideoj estas entenataj en Ĉap.18, precipe 18.2.4 (demokrateco kaj memdisciplino) de la verko *Esperanto en Perspektivo*. La proponoj, prezentitaj en la "Preparoj por la nova Statuto de UEA", kiujn mi rigardas kiel grandan fuŝaĵon kaj el jura-teknika vidpunkto kaj el vidpunkto de elementaj bezonoj de kultura, neŭtrala kaj demokrata internacia organizaĵo, kia devus esti UEA, havas nenion komunan kun miaj konceptoj pri plibonigoj en la nuna Statuto. Tial mi ne deziras, ke mia nomo estu en kiu ajn senco ligita kun la nunaj proponoj.

Prof. d-ro Ivo Lapenna

Pli atenti movadistojn

LA VERKO *Esperanto en Perspektivo* estas vere impona, sed mi rimarkis, ke ĝi estas tro literaturema, aŭ tro dokumentŝata. Oni devas pli atenti t.n. movadistojn, kies nomoj tre malofte aperas, dum multaj bagatelaj verkistoj estas menciitaj. La malsano de la aŭtoroj, ĉu ne?

Miyamoto masao, Japanio

Regula kaj kompleta

TRE MALBONAN impreson kaŭzis ĉe ni la subjektiva recenzo de prof. Kawasaki pri la verko *Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto*, de L. Mimó, en la revuo *Esperanto*, n-ro 831 (3), en kiu li absolas la elizion de la akuzativa finaĵo ĉe "fungoserĉi" kaj "voĉdoni", ĉar, laŭ li, tiu malpermeso ne ekzistas en la Ekzercaro. Jen stranga rezono por pravigi eraran kunmeton. Nu, ĉar en Esperanto la vortordo estas libera, ĉu oni povas diri, do, sen akuzativo: "Mi serĉis kaj trovis fungo" aŭ "mi fungo trovis kaj voĉo donis, aŭ

donis voĉo"? Evidente, ne! Ĝusta estas la Zamenhofa "voĉi" (vd. P.V.).

Surprizas lia demando — kun aserta respondo — ĉu tio estas lernolibro. Dua demando estas "ĉu kompleta?". Lernolibro, kiel vortaro, neniam estas sufiĉe kompleta; sed en tiu de Mimó troviĝas pluraj lingvaj apartaĵoj, ĝis nun tute ne esploritaj, ja menciindaj en recenzo.

Ankaŭ surprizas la demando "ĉu regula kaj laŭ kiu regulo?", ĉar tiu libro enhavas, krom aliaj, kompletajn senesceptajn regulojn pri la tuta konjugacio kaj pri la vortfarado, laŭ mia opinio tute konformaj al tiuj de la Fundamento, kaj imanentaj al la lingvo laŭ la leĝoj de analogio.

V. Hernández Llusera, Hispanio

UEA pledas por pornografio?

JAM KVINAN FOJON troviĝas en la revuo *Esperanto* reklamo pri *ABZ de Amo* — verko evidente pornografia. Mi atentigis pri tio la Centran Oficejon de UEA per mia letero de la 14a de julio 1971, kiam en la n-ro 788 de *Esperanto* troviĝis faldfolio, propagandanta ĉi tiun kaj ankoraŭ alian pornografian libron. Nun de nove mi sentas min devigita skribi al vi pri tio:

La revuo *Esperanto* malbone faras reklamante la pornografian libron — aldonante krome tiel sugestan sloganon. Ne decas, ke UEA, tiel respektinda institucio, faru sin solidara kun tia malpura, nenobla laboro! Per tio UEA povas perdi multajn ĝisnunajn amikojn.

Tadeusz Nowakowski,
katolika pastro, Pollando

Por instigi ankaŭ aliajn

EN ESPERANTO-KLUBO de Oslo, ni kutimas havi vesperan lotumadon, dum la kunvenoj, por helpi al la ekonomio de la klubo. La lotumaĵoj estas donacoj de klubanoj aŭ simpatiantoj.

Dum la klubkunveno la 21an de aprilo 1975, ni decidis donaci al UEA la sumon enspezitan de la tiutaga lotumado. La sumo fariĝis 200,- norvegaj kronoj, kion ni sendas al vi por la Fondaĵo Canuto. Per tio ni deziras instigi ĉiujn Esperanto-klubojn en la mondo agi simile por helpi al la ekonomio kaj laboro de UEA.

Pepita de Caspary, prezidantino de la Klubo

Ne jura sed praktika monopol

EN LA APRILA *Esperanto*, s-ro Forster ("Proponata malegaleco") skribas eraron opiniante, ke "la angla ĝuas monopolon kiel la unua fremda lingvo en la francaj lernejoj". Tio ne estas ĝusta. Kiam gejunuloj eniras la sesan klason, ili devas elekti fremdan lingvon. Plejparte ili prenas la anglan (ĉ. 87%), la aliaj elektas la germanan. En posta studjaro, kie plia lingvo estas deviga, multe da "germanaj lernantoj" elektas la anglan kiel duan lingvon. La angla do ne ĝuas jure sed praktike monopolon. Eble tion volis P.G.F. diri.

Max Noret, Francio

Tradicio en freŝa vesto

LA ĈI-JARA SESIO de la Internacia Somera Universitato — tradicia kaj grava parto de la Universalaj Kongresoj — enkondukos novan eblecon por pli profunda kaj intima scienca kunlaborado. Kiel ĝis nun, estos serio de prelegoj por la kongresa publiko fare de specialistoj en difinitaj sciencaj fakoj. Entute — ok prelegoj estas planataj. Kaj, ĉi-jare por la unua fojo, okazos ankaŭ serio de ok malgrandaj kunsidoj, en kiuj gvidanto—specialisto diskutos apartan temon kun malgranda grupo de interesitaj kongresanoj. Tiujn diskutkunvenojn oni provizore nomas "seminarioj". Kelkaj el la seminarioj estos bazitaj sur scioj akirendaj dum unu el la prelegoj. Por ĉeesti seminarion, kongresano devos plenigi aliĝilon (kiu aperos en la Kongresa Libro) kaj ricevi enirpermeson de la seminaria profesoro mem. La prelegoj daŭros ĝenerale unu horon, inkluzive de 15 minutoj por diskuto. La seminarioj estos pli longaj — 90 minutojn — kaj rezervos duonhoron aŭ pli da tempo por neformala diskutado. La Estraro de UEA, la nove establita Komisiono de ISU, la rektoro de la ĉi-jara sesio de ISU kaj la provizora sekretario de ĉi tiu institucio interkonsultiĝe akceptis provizoran programon, kies detaloj nun estas traktataj kun unuopaj profesoroj. Oni decidis, ke la ĉi-jara sesio emfazu diversajn aspektojn de la fenomeno "lingvo", pro ties granda interesececo inter la plej

multaj esperantistoj, kaj dediĉi du prelegojn al la kongresa ĉeftemo — la Internacia Jaro de la Virino. Tamen, ankaŭ alifakaj temoj estos reprezentitaj: okazos prelegoj kaj/aŭ seminarioj ankaŭ pri literaturo, edukado, biologio kaj optiko. Jen la provizora programo de la kopenhaga sesio de ISU:

Enkonduka festprelego: Paul Neergaard (Danlando), rektoro de la ĉi-jara sesio de ISU.

Prelegoj:

"Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko": Michel Duc Goninaz (Francujo),

"Novaj metodoj en la lingvistiko": Viorel Păltineanu (Rumanujo),

"Utopio kaj literaturo": Humphrey Tonkin (Usono),

"Edukado per komputiloj": Bruce kaj Judy Sherwood (Usono),

"Partopreno de virinoj en la ekonomio": Werner Bormann (FR Germanujo),

"Virinoj kaj scienc-teknika progreso": Bojidar Leonov (Bulgarujo),

"La natura ekonomio de la maro": Carl Støp-Bowitz (Norvegujo),

"La scienco de koloro kaj ĝiaj aplikoj al nia vivo": Tsihide Kuwahara (Japanujo).

Seminarioj:

"Problemoj de lingvo-politiko": Michel Duc Goninaz,

"Problemoj de lingvistika strukturismo": V. Păltineanu,

"Lingvaj problemoj en scienca kaj patent-teknika informado": Bojidar Leonov,

"La ministeria studo de planlingvo antaŭ ĝia enkonduko": Werner Bormann,

"Kelkaj aspektoj de prakseosemiotiko: la teorio de optimaj signoj": Mirosław Wiechowski (Pollando),

"Varioj de literaturaj kaj sociaj utopiismoj": H. Tonkin,

"Metodoj de lingvoinstruado per komputilo" Judy Sherwood,

"Teknologiaj, psikaj kaj sociaj problemoj ĉe la planado de sistemoj de perkomputila edukado": B. Sherwood.

Krome, lige kun la prelego kaj seminarioj pri perkomputila instruado, oni planas loki komputilan terminalon en la kongresejo dum la tuta kongresa semajno. Ĉe tiu terminalo kongresanoj povos sperti la utiligon de komputilo por instrui Esperanton kaj plurajn aliajn fakojn.

Se vi rerigardas al la ĉi-supra listo de la prelegoj kaj prelegontoj, vi ne povos ne konstati, ke la ĉi-jara sesio de ISU proponas al la kongresa publiko plurajn tute novajn nomojn de fakuloj kaj aron da fakaj temoj neniam antaŭe traktitaj en ISU.



Rektoro de la ĉi-jara sesio de ISU: D-ro Paul Neergaard, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj unu el la plej elstaraj sciencistoj aktivantaj en la Movado.

Bonega teksto

Recenzas Ralph A. Lewin (Usono):

Planktono kaj mara produktado, de E. Balech. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1974. 88p. 29cm. Broŝ. Antaŭ kelkaj semajnoj mi partoprenis marbiologian ekspedicion ĉe la meksikia pacifika marbordo. Unue ni iris per flugmaŝino, laŭ la Golfo de Kalifornio, al La Paz. Trafenestre ni observis strangajn flavajn striojn sur la mara surfaco kaj supozis, ke ili indikas polucion; eble nafton elverŝis petrolŝipo. Post du tagoj, tiam surŝipe, kiam ni deproksime revidis la fenomenon, ni povis ekzameni la kaŭzon. Ni trenis nilonan reton kun mallargaj truetoj kaj per tio dum duonminuto kaptis kelkcent gramojn da . . . planktono! Preskaŭ ekskluzive ĝi konsistis el helflavaj sferetoj, diametre ĉ. duon-milimetraj, kun po unu tentaklo: klare ili estis ĉeloj de *Noctiluca*, dinoflagelatoj, kiuj ofte respondecas pri bluverdaj fosforeskaj lumbriletoj ĉe la mara surfaco. (Ĉu ili estas plantoj — multaj dinoflagelatoj povas fotosintezi — aŭ bestoj — ĉar ili nutras sin manĝante pli malgrandajn planktonerojn — oni povas diskuti, senutile. La naturo ne ĉiam agnoskas niajn netajn klasigojn!)

Ni daŭrigis la vojaĝon kaj en la nokto fakte vidis tian fosforeskon en la postondo de nia ŝipo. Denove ni trenis la planktonreton: denove ni trovis nin trompitaj. Jen la kaŭzo estis krustacoj, el kiuj ni kaptis dekmi-lojn da specimenoj: *Meganocythanes* (eŭfaŭsioj), salikoketaj bestetoj, kiuj ankaŭ posedas lumineskan povon. (Ni eĉ povis legi je ties lumado, kvankam ne tre facile!)

La postan tagon, denove flavajn striojn ni renkontis surmare. Ĉu pro dinoflagelatoj, ĉu pro eŭfaŭsioj? Denove la provo de la reto: kaj denove trompo! Jen preskaŭ nenio krom brunaj vermetoj, plathelmintoj, de specio antaŭe vidata kaj konata de neniuj el ni marbiologoj.

Sufiĉas tio por iom indiki, kia estas la studado de planktono — la pli-mapli pasivaj vivantetoj de la maro. (Planktono ekzistas ankaŭ en dolĉaj akvoj, sed jen temo por alia teksto). Pri tio verkis, kaj daŭre verkadas, Balech, eble la plej sperta planktonisto en Sud-ameriko, certe unu el la plej elstaraj spertuloj pri dinoflagelatoj en la mondo. Plie, Balech estas bonega, entuziasma instruisto: tion mi povis persone konstati antaŭ kelkaj jaroj, kiam invitite li gvidis kurson ĉe nia oceanologia instituto (Instituto Scripps de Oceanologio, La Jolla, Kalifornio, Usono).

Tiu ĉi libro ŝajnas al mi ne nur preskaŭ modela teksto pri la mara planktono, sed ege interesa, leginda libro tiutema. Ĝi ne tro multe emfazas la aŭtorajn specialaĵojn (dinoflagelatojn), sed ĝuste traktas pri ĝeneralaj

konceptoj, fotosintezo, produktado kaj produktado (Vi ekonomiistoj: notu la diferencon!), rilatoj inter fito- kaj zoo-planktono, vertikala distribuo, kaj diversaj homaj rilatoj (tiuj lastaj ĉapitroj legendaj ankaŭ de ekonomiistoj). Aldonitaj estas 8-paĝa bibliografio (eĉ kun kelkaj Esperantaj artikoloj listigitaj) kaj 5-paĝa specialtema vortaro, ambaŭ tre trafaj.

Kial mi skribis "preskaŭ modela"? Ĉar mi trovis unu kritikindan aferon ĉi tie, kiel ankaŭ en multaj neesperantaj tekstoj. Ĉe la bildoj kaj skizoj, ne estas indikoj pri la grandeco. En libro pri homoj aŭ katoj, ekzemple, tio ne multe gravas, ĉar ĉiu scias kiom grandaj ni estas. Sed ĉu laiko same intuicie scius pri la grandeco de pteropodo, ktenoforo, ketognato . . . aŭ eĉ planktonreto per kiu oni kaptas ilin? Prefere oni indiku almenaŭ proksimume ĉu tiuj objektoj longas kelkajn metrojn, milimetrojn aŭ mikronojn.

Sed, krom tio, la teksto estas bonega. Feliĉaj la studentoj, kiuj ĉeestis la kurson en Lieĝo, por kiu verkis ĝin Enrique Balech! Kaj feliĉaj ankaŭ tiuj, kiuj legas ĝin poste!

Mendu ĉe UEA: 19,20 (por Nederlando 19,96) gld. plus sendokostoj 10%.

Ankaŭ por pli aĝaj

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando):

Dekopo de Afke, La, de N. van Hichtum. El la nederlanda tradukis T. Brinkman. Leeuwarden: Frisa Esperantista Rondo, 1974. 92p. Ilus. 24cm. Broŝ.

Kun ĝojo mi relegis ĉi tiun libron. Ĉi-foje ĝi estis en Esperanto, kaj mi pli aĝa. Ĉi tiu libro por infanoj (8–80-jaraj) unue aperis en 1903, en la nederlanda. Ĝin verkis Nynke van Hichtum, frisa verkistino, edzino de grava socialdemokrata politikisto. Jen unu el ŝiaj daŭre ŝategataj rakontoj pri la vivo de malriĉaj frisaj kamplaboristoj pasintjarcentaj. "La dekopo" estas la dek infanoj de Afke. Bonhumora dekopo malgraŭ la malbonaj vivkondiĉoj. Amuzaj aventuroj kaj ĝojo pro etaj plezuroj.

Kun ĝuo mi rekonis la konatajn okazaĵojn. Sed. . . por recenzo mi devis kompari la tradukon kun la originalo. Kaj tiam montriĝis, krom kelkaj aparte trafe tradukitaj vortoj ankaŭ io, kion mi ne tuj rimarkis (verŝajne pro mia pliaĝigo): la vigla rakonta stilo de la originalo ne malofte perdiĝas en Esperantaj participoj. "Post kiam" fariĝis "-inte", "dum" fariĝis "-ante".

Dum la aŭtorino klare evitis aktivajn participojn, en la traduko ili svarmas. Mi iom bedaŭras tion, kvankam alilingvaj legantoj verŝajne tion eĉ ne rimarkos.

Do: Multan plezuron ankaŭ al pli aĝaj legantoj! (PS: Mi dubas, ke inter la unuaj vortoj de esperantlingva infaneto troviĝus krom "tio" ankaŭ "ĉi tio".)

Mendu ĉe UEA: 9,- (por Nederlando 9,36) gld. plus sendokostoj 10%.

Laste aperis . . .

Babiladu Esperante! (1974) A. Grzebowski kaj O. Nógrády. 78p. 14cm. Broŝ. 3,60 gld. Helplibreto por turistoj kun Esperanta, pola kaj hungara vortaretoj.

Doutor Esperanto (1973) W. Francini (1926). 135p. 19cm. Broŝ. 4,80 gld. Portugallingva biografio de la kreinto de la Internacia Lingvo.

Ergokrata evangelio, La, de Heinrich Färber. Trad. el la germana. Wien: Matthias Kraintschan, 1975. 98p. 21cm. Broŝ. 3,86 gld. Socireformisma teorio.

Facila Esperanta Lernolibro (1974) L. Sinha (1905). 62p. 25cm. Broŝ. 3,- gld. La unua lernolibro de Esperanto en la bengala.

Individuista manlibreto (1975) H. Riner (pseŭd. de H. Ner 1861-1938). 32p. 21cm. Broŝ. 1,26 gld.

Kial mondcivitano? (1950, nederlanda reeldono 1975). 12p. 21cm. 1,50 gld. (havebla ĉe la eldoninto: B.J. Dudink, Meidoornstraat 69a, Zaandam 1400, Nederlando).

Liberecanaj vivkonceptoj pri soci-organizado (1970, 2a eld. 1975) Fontaura. 28p. 21cm. Broŝ. 078 gld. Aldone ankaŭ la artikolo de J. Grav pri la konduto de individuo en anarkista socio.

Mejdunarodnĵ jazik Esperanto (1974) B.G. Kolker. 67p. 20cm. Broŝ. 4,50 gld. Lernolibro por kursoj, kun kontrolaj taskoj post ĉiu el la 20 lecionoj.

Mia vivo (1975) N. Barthelmess (1897-). 58p. 21cm. Broŝ. 1,26 gld. Aŭtobiografio kaj dek elektitaj artikoloj de la konata gvidanto de SAT.

Naciecaj problemoj (1975) Roza Luksemburg (1871-1919). 30p. 21cm. Broŝ. 0,96 gld. Du artikoloj de la proleta revoluciulo.

Ni kantu en Esperanto (1974). 61p. 20cm. Broŝ. 3,- gld. Kolekto de 29 popularaj kantoj, kun tekstoj kaj muziknotoj.

Ong Thay Day The Gidi Ngu Esperanto (1954) M. Stuttard. Vjetnama eldono (1973). 84p. 26cm. Broŝ. 4,80 gld. Vjetnama traduko de la konata angla lernolibro *The Esperanto Teacher*.

Skizoj pri teorio de Esperanto (1931, represo 1975) E. Drezen (1892-1937?). 40p. 20cm. Broŝ. 3,96 gld. Lingvistika analizo de la Esperanta gramatiko.

The-Gidi-Ngu Nhap-Mon (1968) A. Ribot. Vjetnama eldono (1974). 18p. 26cm. Broŝ. 1,50 gld. Vjetnama traduko de la franca lernilo *Nos premiers pas en Espéranto*.

Travivaĵoj de Guignol, La (1972) L. Moszczynski kaj J. Wilkowski. Trad. E.V. Tvarožek. 49p. 20cm. Broŝ. 3,- gld. Duakta teatraĵo por pupoj.

Unusemajna kurso de Esperanto A. Pettyn. Vääksy: Päijät'Häme, 1974. 31p. Ilus. 15cm. Broŝ. 3,60 gld. Rapidkurso laŭ strukturisma-situacia metodo, t.e. 50 dialogoj en kiuj eblas interŝanĝi la elementojn de la dialogo konservante tamen la saman strukturon.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

Antaŭ 50 jaroj

Ni rajtas do esperi kaj devas labori

La nuna homaro klopodas eliri el ĥaoso kaj starigi sian progreson sur pli unueca, pli harmonia bazo. Esperanto estas unu el la bonaj rimedoj al tio. Ĝi kompletigas la mirindajn eltrovojn kiel radio, kiu povus fariĝi granda detruanto de baroj inter popoloj, se ĝi portos mondlingvon sur siaj flugiloj. Ni rajtas do esperi kaj devas labori. Nia tasko estis neniam pli klara, la vojo neniam pli rekta, la lumo neniam pli hela.

Edmond Privat

Libroŝtelistoj kaj libroalmozuloj

Holanda Esperantisto daŭrigas aprilan artikolon de H. Bulthuis "Slangaĵoj inter verkistoj, legantoj kaj kritikistoj". Por doni ideon pri la verkaĵo ni ĉi tie represas el ĝi kelkajn liniojn: A. Libromaniuloj kolektadas grandan kvanton da libroj, sed ordinare legas nur malmulte. Ili estas kiel avaruloj, ĉar avaruloj kolektadas monon ne uzante ĝin, kaj libromaniuloj kolektadas librojn ne legante ilin. B. Legantoj, kiuj ne speciale kolektas librojn por posedi ilin, sed por legi, ordinare ili havas malgrandan bibliotekon da elektitaj verkoj. Se ni posedus nur tiujn du kategoriojn, nia literaturo florus. . . sed bedaŭrinde ni posedas trian kategorion de legantoj, nome. . . C. kiuj avide legas, sed neniam aĉetas eĉ unu verkon. . . oni povus ilin nomi la parazitoj de la literaturo. . . prunteprenistoj kaj pruntedonistoj de libroj ekzistas abunde. La unuaj

fumas konstante, iras konstante al la bioskopo (kino), ili sin amuzas ĉiamaniere pagante, sed pro la multa fumado kaj cetero ne restas mono por aĉeti libron. . . D. Libroŝtelistoj. . . kiuj mendas librojn kaj neniam pagas la ricevajn verkojn; tiaj legantoj estas nur malmultaj, ĉar oni scias, ke ilia speco ekzistas, kaj saĝa vendisto ne vendas kredite je tro granda distanco. E. Libroalmozuloj. . . kiuj per flatemaj leteroj sin turnas al verkistoj kun la peto ricevi senpage la ĵus aperintan verkon, pri kiu ili tre entuziasmiĝis. (Ĉu s-ro Bulthuis forgesis pri la sesa kategorio de legantoj, pri la librodonacemuloj, kiuj leginte la plaĉan verkon, tuj ĝin aĉetas tri — kvar ekzemplerojn por donaci al la amikoj?)

Mendi nun aŭ loĝi sub steloj?

Ni jam diris, ke, dum aŭgusto, Genève estas plenplena de turistoj kaj oni devas mendi sian loĝejon almenaŭ du monatojn antaŭe, se oni deziras loĝejon. Alimaniere oni riskas efektive loĝi sub la steloj aŭ almenaŭ esti devigata pagi la plej multekostajn ĉambrojn en luksa hotelo, ĉar pensionoj en malpli karaj hoteloj estas jam ĉiuj antaŭe plenigitaj pro mendoj.

La supraj fragmentoj estas sensanĝe transprenitaj el "Esperanto", n-ro 297 (5), majo 1925 kaj el ĝia aldonaĵo "Kongresa Bulteno", n-ro 6. La hodiaŭa aktualeco de la fragmentoj estas laŭplaĉa.

Riĉa elekto de aranĝoj

Majo

- 10-16 27a IFEF-Kongreso, Villach, Aŭstrio (Schliess-fach 117, A-1103 Wien, Aŭstrio)
- 17-19 53a Germana Esperanto-Kongreso, Oberkirch, FRG (Esperanto, Lohmühlweg 1, D-7602 Oberkirch)
- 17-19 Postkongreso de IFEF, Salzburg, Aŭstrio (A. Huber, Minnesheimstr. 17, A-5023 Salzburg/Gnigl)
- 17-19 Sveda Esperanto-Kongreso, Halmstad, Svedio (SEF, Fack, S-122 04 Stockholm-Enskede)
- 23-26 59a Brita Kongreso de Esperanto, Royal Leamington Spa, Britio (K. Hart, 124 Derry-down Road, Birmingham B42 1RU)
- 23-26 70-jara jubileo de Esperanto-klubo, Plzen, Ĉeĥoslovakio (Sindikata Klubo Škoda, Ko-peckeĥo Sady 13, CS-301 13 Plzen)

Junio

- 01-21/7 Esperantistaj Semajnoj, Baugé, Francio (Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 01-31/10 Internaciaj Esperanto-kursoj, Pisanica, Bul-gario (Distrikta Kom. de BEA, pk. 30, Smoljan)
- 07-08 Renkontiĝo de Portugalaj Esperantistoj, Por-to, Portugalio (Port. Esp. Asocio, Rua Dr. J. Couto, Lote 1238, Lisboa)
- 16-27 5a Esperanto-feriado, Miedzyzdroje, Pollando ("Gromada", Pl. Lotników 7, PL-70 414 Szczecin)
- 20 Limdato por aliĝo al la Universala Kongreso
- 28-30 17a Kanada Kongreso de Esperanto, Calgary, Kanado (3019 Hampton Crescent, S.W., Calgary, Alberta, T3E 4R1)

Julio

- 04-07 44a Norvega Esperanto-Kongreso, Tromsø, Norvegio (Box 608, N-9001 Tromsø)
- 05-13 Internacia Tendaro kaj Esperanta Studsemaj-no, Vääksy, Finnlando (T. Suontausta, SF-17300 Vääksy)
- 06-12 13a Somera Esperanto-Universitato, Gyula, Hungario (Str. 48-as 11, H-5700 Gyula)
- 06-20 Somera Esperanto-Lernejo, Dudince, Ĉeĥo-slovakio (E. Váňa, CS-962 71 Dudince)
- 07-24 Pedagogia Esperanto-Seminario, Primošten, Jugoslavio (KEL, Pf. 703, YU-41000 Zagreb)
- 08-15 Internacia Seminario, Karlovo, Bulgario (B. Leonov, Car Asen 7, Karlovo)
- 12-21 8a Internacia Renkontiĝo Naturamika IREN, Abaliget, Hungario (Pf. 2, H-7601 Pécs)
- 13 Internacia Virina Tago, Budapest, Hungario (Pf. 153, H-1443 Budapest)
- 13-26 Internacia FERIA Altlernejo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds)

- 13-10/8 24a Somera Esperanto-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio (Pk. 72, CS-674 01 Třebíč)
- 18-22 35a Hispana Kongreso de Esperanto, Lérida, Hispanio (V. Hernández Llusera, Avda Ejér-cito Español 59, Sabadell)
- 18-25 Konferenco de ILEI, Humlebæk, Danlando (Krogerup Højskole, DK-3050 Humlebæk)
- 19-26 31a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Fredericia, Danlando (C. Lauridsen, Øster-gade 43, DK-7430 Ikast)
- 19-26 KELI-Kongreso, Jönköping, Svedio (B. Ahl-rén, Rögbergsgat. 31 A II, S-116 20 Stockholm)
- 20-26 Internaciaj FERIAj Kursoj, Helsingør, Danlan-do (E. Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingør)
- 20-26 43a Internacia Kongreso de Blindaj Esperan-tistoj, Hillerød, Danlando (s-ino Z. Zacho, Åmosvej 5A, DK-2700 København)



- 22-11/8 Internaciaj Semajnoj, Baugé, Francio (Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 26 Aperis la Unua Libro de Esperanto en 1887
- 26-02/8 60a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando (UEA)
- 26-02/8 48a Kongreso de SAT, Hago, Nederlando (J. Kuijpers, Lombardkade 85b, Rotterdam)
- 27-09/8 Internacia Junulara Feriado, Inowrocław, Pollando (Juventur, ul. Jagiellońska 12, PL-85 067 Bydgoszcz)
- 28-01/8 Internacia Somera Kurso, Barrie, Kanado (Esperanto, 458 Markham St., Toronto, Ontario, M6G 2L2)
- 29-07/8 SEL-sekcio en Monda Ĵamboreo, Oslo, Norve-gio (J. Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo)

Aŭgusto

- 02-06 4a Ornitologia Semajnduono, Norra Lökaröd, Svedio (B. Lindeberg, Klubbegatan 75, S-212 23 Malmö)
- 02-12 14a Skoltknaba Monda Ĵamboreo, Oslo, Nor-vegio (J. Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo)

- 02-16 Somera Esperanto-Lernejo, Košice-Opatka, Ĉeĥoslovakio (Esperanto-klubo, Rooseveltova 5, CS-040 01 Košice)
- 02-16 Junulara Labortendaro, Cavalcasella, Verona, Italio (G.F. Molle, Via Leopardi 30-A/1, I-00185 Roma)
- 03-06 Postkongreso de Esperanto, Aarhus, Danlando (Hörmarksallé 5, DK-8240 Risskov)
- 03-09 Konferenco de Monda Turismo, Inowrocław, Pollando (Juventur, ul. Jagellońska 12, PL-85 067 Bydgoszcz)
- 03-10 21a Internacia Ferio-Semajno, Krommenie, Nederlando (B.v.d.Pol, Teresjkovastr. 15, Krommenie)
- 04-09 2a Somera Migrado en Alpoj, Svislando (SEJ, Cure 5, CH-2035 Corcelles)
- 05-24 Internaciaj Kursoj kaj Internacia Pedagogia Seminario, Burgas, Bulgario (BEA, Pk.66, Sofia)
- 06-09 Postkongreso de Esperanto, Gotenburgo, Svedio (Box 55028, S-400 53 Gotenburgo)
- 09-15 Someraj Kursoj, Barlaston, Britio (H.Barks, 25 Mars St., Smallthorne, Stoke-on-Trent ST6 1PA)
- 10-16 Internacia Feria Altlernejo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-Fonds)
- 11-16 36a Kongreso de IKUE, Roma, Italio (G. Jacobitti, Piazza S. Maria Maggiore 8, I-00185 Roma)



- 12-01/9 Studsemajnoj, Baugé, Francio (Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 15-17 23a ELNA-Kongreso, Brattleboro, Usono (ELNA, P.O.Box 508, Burlingame, Ca 94010)
- 31-06/9 16a Eŭropa Feriosemajno, Fürigen ap. Stansstad, Svislando (E. Glättli, Laurstr. 17, CH-5200 Brugg)
- 31-06/9 Internacia Feria Semajno, Maria-Alm, Aŭstrio (TANEF, Stiegersgasse 6/22, A-1150 Wien)

Septembro

- 01-14 11a Ora Pola Aŭtuno, Miedzygórze, Pollando (Filio de PEA, Pk.16, PL-50 952 Wrocław)
- 05-12 Internacia Junulara Renkontiĝo, Pfaffenhofen, FR Germanio (G. Neumair, Winden 3, D-8069 Scheyern)
- 13-14 17a Kataluna Renkontiĝo, Girona, Hispanio (V. Hernández Llusera, Avda Ejército Español 59, Sabadell)
- 13-19 46a Itala Kongreso de Esperanto, Triesto, Italio (Via Trento 1, I-34132 Trieste)
- 14-24 Ora Feriado, Pamporovo, Bulgario (Distrikta Komitato de BEA, Pk.30, Smoljan)
- 19-21 Trilanda Konferenco (Aŭstr. Ital. Jugosl.), Koper, Jugoslavio (Pf.401, Yu-61 Ljubljana)
- 27-28 9a Kultura Semajnfino, Renens, Svislando (KCE, Postiers 27, CH-2300 La Chaux-de-F.)

Oktobro

- 05-12 8a Pupteatra Internacia Festivalo, Zagreb, Jugoslavio (Amruševa 5/I, YU-41000, Zagreb)
- 17-19 Diversgradaj Esperanto-kursoj, Clacton-on-Sea, Britio (J. Brownlee, 20 Sunnyside Gardens, Upminster, Essex. RM14 3DS)



- 21-25 Pupteatra Internacia Amatora Festivalo, Titograd, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio)
- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj

Novembro

- 15-16 Kultura Semajnfino, Lugano, Svislando (Tiĉina Esp. Ligo, C.P. 14, CH-6512 Giubiasco)

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Tago de Esperanta Libro
- 15 Zamenhof-Tago (L.L.Z. naskiĝis en 1859)
- 28-02/1 5a Vintra Esperantista Ferio, Budapeŝto, Hungario (Pf. 153, H-1443 Budapeŝto)
- 31 Kotizoj de la 61a Universala Kongreso altiĝas.

Regiona agado de TEJO – kien?

ANTAŬ PLURAJ JAROJ, la tiama prezidanto de TEJO, d-ro Renato Corsetti, aperigis artikolon "Ekstereŭropigo – tasko de TEJO" (v. *Esperanto*, decembro 1971, p. 201), kies ĉefa pledo estis malcentrigo de la junulara sekcio de UEA. Sed malcentrigo de TEJO restas aktuala tasko ankaŭ por ĝia nuna estraro, kies du membroj dediĉas sin al la Regiona Agado.

Ĉi-rilate, la unua tasko, kiun ni starigis al ni, estis identigo de la homoj, kiuj pretas labori kun ni. Tial ni dissendis demandaron kaj, kvankam respondoj ne estis multaj, ni jam havas helpemajn personojn en pluraj landoj de ĉiuj kontinentoj. Pere de tiuj homoj ni nun projektas organizi kursojn de Esperanto en la koncernaj landoj kaj lokoj.

Cetere, ankaŭ UEA havas komisionon por Regiona Agado, sed niaj rilatoj funkcias kontentige kaj ni klopodas eviti duobligon de la laboro pere de reciprokaj informoj. Mi devas akcenti, ke unu el la ĉefaj taskoj de tiu UEA-komisiono estas eldoni instrumaterialojn – informiloj, lernolibroj, vortaroj – en naciaj aŭ lokaj lingvoj, kion TEJO finance ne povus entrepreni. Tamen, alia el niaj celoj estas akiri monon aŭ alispecan helpon por subteni nian agadon. Kaj, tie ni atingis sukcesojn: Germana Esperanto-Junularo kontribuis per 200,- germanaj markoj; Junulara Esperantista Franca Organizo pretas sendi instrumaterialon al Senegalio; Hispana Esperanta Junulara Sekcio, kiu jam pasintjare sendis helpon por studentoj el la Tria Mondo en la studenta domo TESCO en Budapeŝto, sendas sian bultenon *HEJS* al pluraj ekstereŭropaj adresoj; Esperanta Meksika Junularo ĵus eldonis hispanlingvan tradukon de la verko *Doktoro Esperanto* de Maria Ziolkowska kaj pretas utiligi ĝin por informaj celoj; ankaŭ Esperanta Junulara Asocio de Nov-Zelando dissendas sian bultenon *Junularo* al pluraj aziaj adresoj. Ŝajne, ekzistas iaj malfacilaj eblecoj por organizi kursojn en Acoroj kaj Hispana Afriko. Israelo kaj Meksikio havas organizitan Movadon, kiel estas ankaŭ en Japanio. Portugalio kaj Vjetnamuo estas helpindaj, almenaŭ ĝis la fondo de landaj TEJO-sekcioj tie. Kompreno de la Movado en Malagasa Respubliko ne estas facila; tamen, mi opinias, ke la nuna stato de Esperanto tie ne estas tiel brila, kiel ŝajnas laŭ kelkaj aliaj eldonaĵoj. Jemeno kaj Tajvano estis ankaŭ sur la listo de la ricevintoj de niaj sciigoj. (Mi menciui, ke ni al Jemeno sendis leteron en la araba lingvo). En Irako, Irano kaj Senegalio ni nun provas organizi kursojn.

Necesas substreki, ke s-ro Danfa Thiarno, instruisto pri tekniko en Dakaro (Senegalio), jam de pluraj jaroj tie gvidas kursojn de Esperanto sub malfacilaj kondiĉoj, precipe pro manko de instrumaterialo. Kvankam li ne estas vera izolulo, s-ro Thiarno estas la nura aktivulo en Senegalio kaj ni esperas helpi lin por tiuj kursoj ĉe la Teknika Lernejo, des pli, ke niaj ĝisnunaj rilatoj estas tre kontentigaj.

En la marta numero de *Esperanto* mi legis pri kurso en Teherano, gvidata de s-ro Mohammed Labib, pri kio mi antaŭe ne aŭdis. Aliflanke, mi havas proponon de s-ro Badiollah Samimy, instruisto pri la kulturo de la antikva Irano, por instrui Esperanton. Tial mi esperas baldaŭ organizi pliajn kursojn en la irana ĉefurbo. Verŝajne ni povos organizi kursojn ankaŭ en Irako, kie mi kontaktas kun s-ro Adil Hamodah Hani.

Unu el la trajtoj de nia nuna kampanjo estas klopodoj forigi troan teoriismon el nia agado kaj iel certigi la necesan financon bazon por subteni la disvastigon de la Internacia Lingvo en la evolulandoj, aparte tie, kie ni jam havas homojn pretajn labori.

Juan Azcuénaga,
TEJO-estraro pri Regiona Agado

Fredericia por idilio

LA PREPAROJ por la 31a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (1975-07-19 – 07-26) en Fredericia, Danlando, progresas kontentige, kvankam sufiĉe da zorgoj donas la financa aspekto de la aranĝo. Plej efika maniero por tiurilate helpi al la organizantoj estas mem aliĝi al la Kongreso. Ĉu vi scias, ke tion ĝis la fino de aprilo jam faris 185 junaj homoj el la tuta mondo? En Fredericia oni ne devos serĉi "Tivoli" por iom ripozi,



ĉar la tuta urbo kuŝas en idilia pejzaĝo (v. la foton), ekster grandurbaj bruo kaj nenatureco. Pri aliaj detaloj v. nian aprilan numeron aŭ skribu al: **IJK, Christian Lauridsen, Østergade 43, DK-7430 Ikast, Danlando.**



60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Kopenhago (Frederiksberg), 1975 07 26 – 08 02.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Postboks
1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Eminentuloj en la Honora Komitato

Politikaj ŝanĝoj en Danlando malfruigis la formiĝon de Honora Komitato de la 60a UK, sed nun eblas anonci, ke inter ĝiaj anoj troviĝas la ministro pri kulturaj aferoj, s-ro Niels Matthiasen, la ministro pri instruado, s-ro Ritt Bjerregaard, la prezidanto de la dana parlamento, s-ro Karl Skytte, la ĉefurbestro de Kopenhago, s-ro Urban Hansen, la ĝenerala direktoro de la danaj radio kaj televido, s-ro Hans Sølvhøj, la urbestro de Frederiksberg, s-ro A. Stæhr Johansen, kaj la prezidanto de la radia konsilantaro, s-ro Jørgen Kleener.

Invitoj al la registaroj

Ĉiuj landoj, kun kiuj Danlando havas diplomatiajn rilatojn, estas invitataj, pere de la ambasadoj en Kopenhago, oficiale reprezentigi en la Kongreso. Samtempe la prezidanto de UEA sendis inviton al la nova ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, kun peto, ke la monda organizaĵo reprezentigu en la 60a Universala Kongreso de Esperanto.

Programo jam preskaŭ kompleta

En sia kunsido en Rotterdam, de la 11a ĝis la 13a de aprilo, la Estraro de UEA aldonis preskaŭ la lastajn pecojn al tiu granda mozaiko, kiu estas la kongresa programo. Al la jam ampleksa kunsidaro ĝi aldonis, interalie, publikan kunsidon pri la Statuto de UEA, seminarion pri la financa kampanjo, kunvenon pri CED kaj renkontiĝon de kongresanoj kun la redaktoroj de internaciaj Esperanto-periodaĵoj.

Danio en nuksoŝelo

Okaze de la 60a Universala Kongreso de Esperanto, la dana ministerio pri eksterlandaj aferoj eldonas en la Internacia Lingvo flugfolion *Danio en nuksoŝelo*.

Tivoli: Esperanta renkontiĝejo

La parko—amuzejo Tivoli, amata same de turistoj kiel de kopenhaganoj, fariĝos renkontiĝejo de esperantistoj en dimanĉo, la 27an de julio. Dum tiu tuta tago, ĉiu kongresano ĝuos senpagan enirrajton en Tivoli, montrante nur la kongresan karton.



Mendeblaj afiŝoj pri Kopenhago

Malfrue — sed tamen aplaŭdinde — la turisma unuiĝo de Kopenhago decidis disponigi al la Kongreso 250 ĝis 300 afiŝojn pri la kongresurbo kun Esperanta teksto. Klubo kaj unuopuloj, kiuj deziras mendi la afiŝon, bv. turni sin al la adreso de la Loka Kongresa Komitato, aldonante 3 internaciajn respondkuponojn por la sendokostoj.

Statistiko (1975-04-20)

Arg. 1, Aŭstral. 8, Aŭstr. 9, Belg. 24, Braz. 3, Brit. 47, Bulg. 20, Ĉeĥosl. 3, Danl. 117, Egipt. 2, Finnl. 54, Franc. 91, FR Germ. 82, Germ.(Berlino Okc.) 11, Grekl. 4, Hind. 1, Hisp. 13, Hung. 32, Irl. 1, Isl. 9, Isr. 5, Ital. 37, Jap. 32, Jugosl. 9, Kan. 9, Kor. 2, Malag. 1, Meks. 2, Mon. 1, Nederl. 90, Norv. 10, Nov.Zel. 1, Poll. 8, Port. 3, Rum. 1, Sud-Afr. 5, Sved. 125, Svisl. 13, Turk. 1, Urugv. 1, Usono 51, Vjetn. 1, Zair. 1. Entute: 941 kongresanoj el 43 landoj. Krome, el la landoj kun transpagaj problemoj, provizore aliĝis 160 personoj, kiuj sian aliĝkotizon intencas pagi ĉe la alveno en Kopenhago.

FR Germanio

- Laŭ la novaĵbulteno *Pilo-Press*, Bundestag, la federacia parlamento de FR Germanio, en sia kunsido de la 23a de januaro 1975 traktis peticion de la deputito August Wetterstein pri pli intensa apogo al Esperanto fare de oficialaj instancoj, la gazetaro, radio kaj televido. En la parlamento oni atentigis, ke la precizigo, farita en 1973, difinas la federacian ministerion pri klerigo kaj scienco kiel kompetentan instancan por trakti aferojn ligitajn al Esperanto. Jam tiu identigo de la kompetenta ŝtata instanco rezultigis pli grandan atenton al Esperanto en FR Germanio. La parlamento konkludis, ke ne eblas fari premon al la amaskomunikiloj, ĉar tio tuŝas ilian konstitucie garantiitan liberecon.

Argentino

- Argentina Esperanto-Instituto, kiu dank' al Ergoto de Bonaero fariĝis unu el la plej viglaj eldonejoj en la Movado, komence de ĉi tiu jaro aperigis ankaŭ plaĉan, bone ilustritan dukoloran informilon pri la Internacia Lingvo — . . . *qué es el Esperanto?*. La 16-paĝa informilo celas kontentigi tiurilatajn bezonojn de ĉiuj hispane parolantaj landoj kaj donas adresojn de Esperanto-informejoj en 13 ŝtatoj.

Jugoslavio

- En la marborda urbo Split, kie dum jardekoj aktivas bona Esperanto-societo, antaŭ iom pli ol du jaroj fondiĝis aparta Esperanto-klubo en la novkonstruita urboparto. Tiu nova klubo jam havas 125 membrojn kaj ĝi ofte aperas sur la paĝoj de regiona ĵurnalo kaj en la programo de Radio Split. En la urbo oni instruas Esperanton en du elementaj kaj unu mezgrada lernejoj, kaj la studentoj de la Ekonomia Altlernejo povas studi Esperanton kiel nedevigan fakon. En la Altlernejo funkcias aparta Esperanto-sekcio.
- En la ekonomia mezlernejo de la urbo Niš funkcias du Esperanto-kursoj por entute 40 gelernantoj. La lokaj gazetaro kaj turismaj aŭtoritatoj tre favore rilatas al la aktiveco de la tiea Esperanto-klubo.



Lugano: Ĉu la svisa urbo, kiu jam en 1972 eldonis esperantlingvan turisman prospekton, baldaŭ gastigos Universalan Kongreson (v. ĉi-sube: Svislando)?

Svislando

- Laŭ *Svisa Esperanto-Revuo* (marto 1975), la landa asocio de UEA en Svislando serioze traktas eblecojn, ke Svislando invitu Universalan Kongreson dum unu el la sekvantaj jaroj. Oni atentigas, ke la lasta UK en Svislando estis tiu en Bern en la jaro 1947. La svisa urbo, kiu post tri jardekoj denove gastigus la ĉefaranĝon de la Esperanto-movado, ankoraŭ ne estas elektita, sed oni kiel plej verŝajnan kandidaton mencias la urbon Lugano, dum Basel, Winterthur kaj St. Gallen estas menciataj kiel lokoj por gastigi malpli grandan internacian aranĝon.

Ĉeĥoslovakio

- Pro multjaraj kontaktoj pere de Esperanto inter ges-roj Landheer el Aerdenhout, Nederlando, kaj s-ro Ernesto Váňa el Dudince, Ĉeĥoslovakio, s-ro Hugo Landheer, akademia pentristo, pasintjare donacis 60 pentraĵojn al la banloko Dudince, kie ili nun fariĝis parto de konstanta ekspozicio.

Francio

- Post tre sukcesa prelegserio pri Esperanto, en lernejoj de la regiono Pyrénées-Orientales, dum la printempo pasintjare (v. nian revuon, aprilo 1974, p.76), s-ro René Llech-

Walter, honora prezidanto de UFE kaj UEA-delegito, ankaŭ ĉi-jare ricevas invitojn por tiaj prelegoj. Sed, diference de la pasinta jaro kiam li mem iniciatis la serion, ĉi-jare al s-ro Llech-Walter (nova adreso: 72, av. Général de Gaulle, F-66 Perpignan) la proponoj venas de la lernejoj mem.

Britio

- En Clacton-on-Sea, de la 11a ĝis la 13a de aprilo, okazis renkontiĝo en kies kadro oni organizis jarkunvenon de Orienta Esperanto-Federacio de Britio kaj koncerton de la svisa muzikistino Danielle Béguin, kiu gastis, krome, en pluraj aliaj lokoj de Britio, kelkfoje koncertante ankaŭ por la ĝenerala publiko. En Keighley, f-ino Béguin koncertis en South Craven School, kie Esperanton lernas ĉ. 300 gelernantoj.

Rumanio

- Post la antaŭ nelonga oficialigo de la Esperanto-rondo en Suceava (pli ol 400 membroj), tie ekfunkciis du novaj kursoj gvidataj de s-roj T. Apetroaie kaj M. Enache. La rondo disponas pri grandega, teknike bone ekipita salono en la loka kulturdomo. Krome, la rondo en Suceava funkciigas ankaŭ korespondan kurson laŭ instrumaterialo preparita de inĝ. Radu Petrascu el Bukareŝto.

Kolombio

- Ni jam plurfoje raportis pri vigla poresperanta aktiveco en Kolombio, sed ĉefe temis pri la agado en la urbo Medellín. Lastatempe ekfunkciis du Esperanto-kursoj ankaŭ en la ĉefurbo Bogota, unu kun 100, alia kun 20 partoprenantoj. La kursojn prizorgas prof. Augusto Ochoa, prezidanto de la Bogota Esperanto-Ligo. Prof. Ochoa pasintjare restadis en FR Germanio kaj tie sukcese ekzameniĝis ankaŭ ĉe la Germana Esperanto-Instituto.

Italio

- En Pisa oni represas la italan tradukon de la broŝuro *Wanted a World Language* de Mario Pei. La eldonkvanto de la represo, prizorgata de Itala Esperanto-Federacio, estos 2000 ekzempleroj.

Danlando

- Dum trisemajna restado en Skandinavio, la Ŝtata Pupteatro el Plovdiv, Bulgario, faris unusemajnan turneon tra Danlando (v. ankaŭ nian martan numeron, p.56) kaj sep-

lando kun *La scivola elefantido*, pupteatraĵo laŭ fabelo de Kipling. Oni, kompreneble, ludis en Esperanto kun kelkloka traduko en la danan, kio helpis starigi pli intiman kontakton kun la spektantaro. La dana ministerio pri kulturo subtenis la turneon en la kadro de la kultura kunlaboro inter Bulgario kaj Danlando. La turneon organizis s-ro P.V. Bagger, gimnazia instruisto en la urbo Roskilde.

Suda Koreo


- D-ro Gim Sam-Su ricevis financon apogon por studi la historion de la Esperanto-movado en Koreo. Tiu subteno venas de ekstermovada instanco – Stipendia Fondaĵo de la Korea Industrio.

Belgio

- Dum la Eŭropa Esperanto-Konferenco, fine de aprilo en Bruĝo, s-ino Bernaerts el Antverpeno iniciatis monkoklekton profite al UEA. La rezulto de la kampanjo estis 10 000 belgaj frankoj (ĉ. 700,- gld.)!

Brazilo

- Prof. Elvira Fontes, komitatanino de UEA kaj prezidantino de la Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, informis nin, ke inter la 12a kaj la 25a de aprilo 1975 en la Urba Biblioteko de la plurmiliona San-Paŭlo okazis tre sukcesa ekspozicio pri la Internacia Lingvo. La ekspozicio rezultigis plurajn informojn kaj artikolojn en la gazetaro kaj grandan alfluon de novaj lernantoj en Esperanto-kursoj.



Fake

Parlamentanoj

- Lige al la iniciato de nederlanda membro de la Eŭropa Parlamento (v. nian februaran numeron, p.37), la sekretario de la internacia fako de la Itala Social-Demokrata Partio, s-ro V. Mihelj, skribis al du italaj membroj de la Eŭropa Parlamento, senatano E. Ariosto kaj deputito E. Rizzi, atentigante ilin pri la graveco, kiun la partio donas al la starigitaj demandoj, pledantaj por stimulo de la instruado kaj uzado de Esperanto. S-ro Mihelj informis la parlamentanojn ankaŭ pri la iniciato de sia partio ĉe la Socialisma Internacio rilate la adopton de la Internacia Lingvo. Estas notinde, ke la tiutema broŝuro de la itala partio jam aperis en germana kaj sveda tradukoj.

Interlingvistiko

- Kiel ni jam anoncis (februara numero, p. 26), la Modernlingva Asocio de Usono ankaŭ ĉi-jare dediĉos profesian atenton al Esperanto en siaj seminarioj, inter la 27a kaj la 30a de decembro 1975 en San-Francisko. La seminarion pri la temo "Esperantaj lingvo kaj literaturo" organizas prof. d-ro Dennis Q. McInerny (Dept. of English, Bradley University, Peoria, Illinois 61625, Usono), kaj la seminarion pri la temo "Kiel difini interlingvistikon?" prizorgas prof. d-ro Robert St.Clair (Interdepartmental Program in Linguistics, University of Louisville,

Louisville, Kentucky 40208, Usono). Porponojn pri kontribuaĵoj oni baldaŭ sendu al la organizantoj.

Kibernetiko


- La Instituto pri Kibernetika Pedagogio en Paderborn, FR Germanio, antaŭ kelka tempo publikigis 72-paĝan raporton pri sia agado ekde la jaro 1971 kaj pri siaj estontaj planoj. La raporto aperis dulingve – en la germana kaj en Esperanto, kun resumo en la angla, franca kaj itala.

Skoltoj

- Renkonte al la Monda Ĵamboreo en Norvegio (v. la Kalendaron en ĉi tiu numero), Skolta Esperanto-Ligo antaŭ kelka tempo reeldonis la lernolibron *Ĵamborea lingvo* de J.K. Hammer. La nova (tria) eldono aperis en tre konvena poŝformato kaj kostas nur 1,80 gld.

Instruado

- La Eŭropa Klubo el Paderborn, FRG, intencas aranĝi feriajn Esperanto-kursojn en Primošten, Jugoslavio, inter la 3a kaj 30a de aŭgusto. Specialaĵo de tiuj kursoj estas, ke duono de la instruado okazos pere de la nova instruaŭtomato "Robbimat-2" (v. nian februaran numeron, p. 28), kaj la alia duono estos plenumita en la tradicia instruformo. Aliĝojn por la kursoj akceptas: Eŭropa Klubo, Riemekstr. 62, D-479 Paderborn, FR Germanio.



foje prezentiĝis en la urboj Roskilde, Faxe kaj Albertslund. La sama pupteatro jam gastis en Danlando en 1973 prezentante la faman fabelon de H.C. Andersen *La neĝa reĝino*. Ĉi-foje la bulgara teatro venis al Dan-

Informado

- Post plurjaraj provoj revivigi la bultenon de UEA *Internacia Gaze-tara Servo*, ŝajnas, ke oni trovis kontentigan solvon kaj, ke la bulteno reaperos en aŭtuno ĉi-jare. S-ro Franko Luin, komitatano de UEA, iama redaktoro de *La Praktiko*, konsentis redakti IGS. La nova serio de IGS havos iom alian formon kaj ĉefe celos la landojn en kiuj la Movado estas forta kaj povos ekspluati novaĵojn el la bulteno. En unu el la proksimaj numeroj de nia revuo vi trovos pli da detaloj pri *Internacia Gazetara Servo* de UEA.

- Dum la lastaj monatoj estas farata konsiderinda informa laboro en vastegaj, ĝis nun senmovadaj, regionoj de Soveta Unio (Norda Uralo, Orienta Siberio, Ekstrema Oriento, Ĉukutska Duoninsulo k.a.) per aperigo de artikoloj en la loka gazetaro. Al la multnombraj informpetantoj estas sendata la lernolibro de Boris Kolker kaj pluraj aliĝas al koresponda kurso gvidata — kiel la tuta kampanjo — de la Esperanto-klubo en Ufa.

Radio

- Aprila numero de la bulteno de la Vatikana Radio aperigis leteron de leganto, kiu pledas por starigo de esperantlingvaj elsendoj. Tiurilate eventuale helpus amasa letera subteno (en la naciaj lingvoj) adresita al: RADIOVATICANA, Città del Vaticano.

Eldonaĵoj

- Pri la apero de la verko *Esperanto en Perspektivo* raportis la tokia ĵurnalo *Yomiuri Sinbun* (eldonkvanto 5 885 000 ekzempleroj) la 26an de marto. La artikolo citas ankaŭ el la recenzoj aperintaj en la februara numero de nia revuo.

Lernolibroj

- Antaŭ la publiko de Moskva Internacia Esperanto-Klubo, la sovetlingvisto S.N. Kuznecov faris (fine de marto 1975) analizon superrigardon pri la Esperantaj lernolibroj en la rusa lingvo, ekde la unua lernolibro de d-ro Zamenhof ĝis la nuntempe uzataj libroj de A.A. Kerner kaj B.G. Kolker. S-ro Kuznecov tre detale priparolis ankaŭ la lernolibrojn de Svistunov kaj Rublov, kiuj en la 20aj kaj 30aj jaroj de la jarcento estis tre vaste uzataj.

Bibliotekoj

- S-ro John Fleming (P.O.Box 2262, Chicago, Ill. 60690, Usono) fariĝis speciala komisiito de UEA pri kampanjo, kies celo estas pligrandigi la ekzistantajn kaj instigi la kreon de novaj kolektoj de la Esperanta literaturo en grandaj esplorbibliotekoj. En la unua periodo la kampanjo ĉefe celas bibliotekojn en Usono.

Kongresoj

- Laŭ lastatempaj informoj, du naciaj Esperanto-kongresoj pri kiuj ni skribis en niaj antaŭaj numeroj — ne okazos. Temas pri la Unua Kongreso de Portugalaj Esperantistoj, kiu estus devinta okazi en Braga komence de junio, kaj la 20a Kon-

greso de Jugoslaviaj Esperantistoj, kiu estis antaŭvidita en la urbo Ĉakovec por la komenco de julio.

Lernejoj

- Lastatempe en Svislando okazas sufiĉe vigla lerneja aktiveco pri kies unu aspekto d-ro T. Carlevaro verkis draŝan kritikon en la aprila numero de *Monata Cirkulero*, bulteno de la Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds. Grupo de kvardek da profesoroj, instruistoj kaj studentoj komence de februaro lanĉis kampanjon "Esperanto en lernejojn!". Oni volonte interŝanĝas spertojn kaj planas eldoni serion de senpage distribuotaj dokumentoj. (Adreso: s-ro Olivier Tzaut, Ecole primaire, CH-2610 Mont-Soleil).

Persone

Jakubcová

- Nur lastatempe kaj hazarde ni eksciis, ke Milda Jakubcová, latva poetino, kiu delonge vivas en Ĉeĥoslovakio, jam en 1970 eldonis kolekton de 100 fabloj sub la titolo *Estrado de animaloj*. La teknike modeste prizorgita libro estis eldonita de la kulturdomo en Banská Bystrica dank' al klopodoj de s-ro E. Váňa. La 500 ekzempleroj tre rapide forvendiĝis. Milda Jakubcová, kiu antaŭ unu jaro fariĝis 75-jara, multe tradukis el la latva literaturo kaj kun Elvira Lippe redaktis la poemaron de J. Rainis kaj la volumeton *Latva poezio*.

Tonkin

- D-ro Humphrey R. Tonkin, la prezidanto de UEA, gajnis unujaran Stipendion Guggenheim por verki studon pri la rolo de la mitologio kiel struktura elemento en la angla renesanca literaturo. Tiucele d-ro Tonkin pasigos la venontan akademian jaron en la Oksforda Universitato en Britio, kio siavice signifas, ke lia nuna adreso en Usono provizore ĉesos validi ekde la 1-a de julio.

Angelova


- La bulgara kantistino Maria Angelova, kiu dum kelkaj lastaj jaroj regule kun sukceso partoprenis artajn aranĝojn dum la Universalaj Kongresoj, fine de la pasinta jaro havis solistan koncerton en Sofia kaj notis plian sukceson.

Auld

- Dum la 70a(!) Skota Esperanto-Kongreso, okazinta en Glasgovo inter la 11a kaj la 13a de aprilo, unu el la plej konataj aŭtoroj en la Internacia Lingvo, William Auld, faris prelegon pri la temo "Lingvo kaj kulturo".

Armand

- Prof. d-ro David L. Armand, kiu en aprilo ĉi-jare fariĝis 70-jara, en la komenco de marto prelegis en la Moskva Geografia Societo pri Esperanto kiel solvo de lingvaj problemoj por geografoj. Multaj el pli ol cent



ĉeestantoj aliĝis al organizota kurso de la Internacia Lingvo. Lige al la prelego oni aranĝis ankaŭ sukcesan ekspozicion de geografia literaturo en Esperanto.

N-ro 489, 1975-03-31

NOVA DUMVIVA MEMBRO

BRIT: Catherine C. Preston.

SOCIETO ZAMENHOF 1975

SVED: 53 E. Johansson. HISP: 54 J. Climent. NED: 55 R.H. Bossong. US: 56 Germaine Chomette; 57 J. Balbin; 58 Paul J. Burke; 59 John Futran; 60 Wm.W. Glenney; 61 M. Lewin; 62 Joel Silverman. FRG: 63 Ellen Eggers; 64 Hans Schütt. BELG: 65 s-ino van Ginderen-Martens. NED: 66 H. Veenstra. SVED: 67 S. Stenström; 68 F. Nordberg; 69 L. Lagerkrantz; 70 Å. Ahlren; 71 Erik Carlén; 72 Frank Carlén.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1975-07-15 neniu membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

FRANC: Georges Fontana, JD Antibes. FRG: Roland Schleske, FD Schwäbisch Hall. HUNG: Kálmánné Pandur, FD Budapest. ITAL: G. Légori, VD Verbania Intra. NED: W.G. van Eyndthoven, FD Amsterdam. SVED: Gunnar H. Särnholm, FD Alingsås; Chris B. Vos, D Västerås. US: Elliot J Zais, FD Houston.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en la Jarlibro 1975:

BRIT: London, D. FRANC: Calais, FD (komerco) kaj FD (turismo). HISP: Gijón, D kaj FD (turismo). SVED: Trelleborg, D kaj FD (instruado). SVISL: Novazzano. US: Austin, D.

DONACOJ 1975 (Gld.)

FONDAĴO CANUTO: FR Germanio: Josef Eder 321,18. Nederlando: Esperanto-Grupo Hilversum 225,35. Sumo ĝisnuna 1359,14.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: Franz Liebl 12,21; Erich Weferling 2,02. Japanio: M. Suzuki 5,-; Y. Takanashi 19,-. Svedio: Erik Carlén 308,30. Usono: Don R. Jones 14,09;

J.L. Lewine 58,68; Memore al Jessie Sumner 242,80; Elfriede Walters 23,48. Sumo ĝisnuna 1219,83.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: E.J.F. Wilmink 3,75. Sumo ĝisnuna 19,31.

EKSIĜO DE URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO

La 6an de aprilo 1975 la jarkunsido de Urugvaja Esperanto-Societo konfirmis ĝian decidon ekxiĝi kiel aliĝinta landa asocio de UEA. Sekve,

d-ro R. Zeballos Morales ne plu estas observanto ĉe la Komitato de UEA. Li tamen restas Ĉefdelegito de UEA por Urugvajo kaj plue peras la kotizojn kiel kutime.

ADRESSANĜO DE LA ĈD FINNLANDA

La Ĉefdelegito de UEA por Finnlando anoncas adresŝanĝon: S-ro Harri Laine, Jaakkimantie 24 A 3, SF-02140 ESPOO 14; telefono: 90-518050. La numero de lia poŝta ĝirkonto (39135-3) restas sensŝanĝa.

Esperanto en radio

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Por aliaj detaloj vidu la aprilan numeron de nia revuo.

SVISA RADIO. De majo ĝis oktobro la jenaj ondolongoj estas uzataj: 1) ĉiuj elsendoj per 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz); 2) lunde kaj merkrede ondoj direktitaj al Afriko 19.82m (15140 kHz), 19.60m (15305 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.94m (21520 kHz); 3) ĵaŭde kaj sabate ondoj direktitaj al Afriko 31.28m (9590 kHz), 25.60m (11720 kHz), 25.27m (11870 kHz), 19.60m (15305 kHz).

POLA RADIO. Samaj horoj por la ĉiutaga elsendo, sed la ondo 41.27m (7217 kHz) ne plu estas uzata en la matena programo. La "Esperanto-anguleto" en la germanlingva programo estas nun dissendata per la ondoj 49.22m (6095 kHz), 42.11m (7125 kHz), 41.18m (7285 kHz), 31.45m (9540 kHz) kaj tiu en la svedlingva programo ankaŭ per la ondo 200m (1502 kHz), krom la jam uzataj mallongaj ondoj.

ITALA RADIO. Sama horo ĉiun dimanĉon, sed per ondoj 50.08m (5990 kHz), 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz). La programo temas pri "Novaĵoj el Italujo", "Kuriero de Esperanto", "Leterkesto".

La itala radio decidis statistike kalkuli, dum kelka tempo, la korespondadojn, kiuj alvenas al la diverslingvaj sekcioj por eksterlando. La celo de

tiu nombrado estas forigi la elsendojn, kiuj ne altiras sufiĉe da aŭskultantoj kaj eventuale plifortigi aŭ plilongigi tiujn, por kiuj estas granda interesiĝo. Dum la lastaj monatoj la korespondado de la Esperanto-sekcio de Radio Romo kontentige kreskis tiel, ke nun tiu sekcio troviĝas inter la unuaj. Tio jam altiris la atenton kaj la simpatieco de la estroj. Ekzistas do favoraj premisoj por plua ekspluatado de la cirkonstancoj kaj plifirmigo de la pozicio de la elsendo en Esperanto. Sed, por tion atingi estas necese, ke: 1) esperantistoj loĝantaj en landoj jam nun atingataj de Radio Romo en Esperanto (nordokcidenta Eŭropo) laŭeble aŭskultu ĝin kaj sendu rimarkojn kaj sugestojn pri la aŭdebleco kaj pri la enhavo, kaj/aŭ petu senpagan ekzempleron de la ilustrita programbroŝuro; 2) esperantistoj loĝantaj en aliaj landoj, kie la voĉo de Radio Romo en Esperanto ne alvenas, petu, ke oni elsendu ankaŭ en aliaj tagoj aŭ horoj aŭ per aliaj ondolongoj tiel, ke la programo povu atingi ankaŭ la koncernajn landojn; 3) skribante, oni menciui, ke oni interesiĝas ne nur pri Esperanto, sed ankaŭ pri la itala kulturo (historio, arto, literaturo, ekonomio, sociaj aferoj, religio ktp.), ĉar, kompreneble, Radio Romo elsendas en Esperanto precipe por diskonigi la italan kulturon. Oni skribu al: Radio Roma, Esperanto, Casella Postale 320, I-00100 Roma.

HENRI KERVERS 1916-1975

La 24an de aprilo forpasis s-ro Henri Kervers, honora prezidanto de la LEEN-sekcio en Hago, Nederlando. Dum pli ol 40 jaroj en la Movado, li estis prezidanto de la landa asocio de UEA en Nederlando, redaktoro de *Nederlanda Esperantisto*, fakdelegito de UEA kaj elstara aktivulo en la landa Esperanto-movado. En 1959 li iniciatis Esperanto-kurson en la gazeto *De Posthoorn* (eldonkvanto 200 000 ekz.) al kiu aliĝis pli ol mil kursanoj. S-ro Kervers kunlaboris

ankaŭ en la organizo de la 49a UK en 1964, en Hago, en kies LKK lia edzino (multjara komitatanino de UEA) estis vicprezidanto.

ANNA BÁROCHOVÁ 1894-1975

La 26an de aprilo mortis Anna Bárochová, honora membrino de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ŝi lernis la Internacian Lingvon en 1921 kaj depost la jaro 1927 senĉese estis komitatanino de la Esperanto-Klubo en Prago.

J. G. FOWLER 1899-1975

Post mallonga malsano, la 19an de februaro 1975 en Londono forpasis s-ro John Gifford Fowler, delegito de UEA en la brita ĉefurbo kaj vicprezidanto de la Londona Esperanto-Klubo. Li aktivis en la Movado plejnajn kvardek jarojn kaj dum longa tempo prizorgis la bultenon de UEA *Unesko-Novaĵoj*.

EMMA SCHARFF 1910-1975

En Lyngby, apud Kopenhago, la 2an de aprilo 1975 forpasis s-ino Emma Scharff, prezidantino de la loka Esperanto-klubo, membro de UEA ekde la jaro 1945 kaj dum pluraj jaroj delegito kaj fakdelegito.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Fraŭlo 30-jara, nenies filo, ministo, en laborista hotelo, deziras korespondi edziĝcele kun laborema, serioza samideanino aŭ germanlingva knabino el Skandinavio, Germanio, Aŭstrio. Knabino, kiu gepatrojn aŭ fileton havas, pli agrabla. Skribu registrite: Johano Beleznai, Györi u. 16/B, H-2800 Tatabánya, Hungario.

Lernejaj Esperanto-grupoj (15 jaroj) serĉas grupkontakton eksterlande. Skribu al: s-ro Nutton, South Craven School, Crosshills, Keighley, Anglujo.

Knabo, 9 j., gimnazio, deziras korespondi kun ĉiuj landoj: Roman Treitz, Markt 5, D-2 Hamburg 28, FR Germanio.

39-jara inĝeniero deziras korespondi edziĝcele kun eŭropa similaĝulino. Roland Wilkins, 21 Sandpiper Road, Porthcawl, Glamorgan, Britujo.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkupono kompletan liston de siaj programoj.

Vojaĝonte al Ĉeĥoslovakio, Greklando aŭ Jugoslavio, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj. Adreso: UEA, Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002.

Apoteka asistantino kolektas materialon uzatan en la apoteka praktiko (vazoj, etiketoj, saketoj, sigeloj ktp)



por ekspozicio ĉi-somere en hungara urbeto. Adreso: Maria Balogh, Tanácsköztársaság u. 63-65 III. 5. H-5600 Békéscsaba, Hungario.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

Helpemaj esperantistoj estas invitataj eltrovi ĉu ekzistas propralanda listo de asocioj por suferantoj diversmalsanaj. Ken Hadler, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo.

POSTKONGRESO 1975! Unika aranĝo inter oficiale ĝemelaj urboj — AARHUS, Danlando, de la 3a ĝis la 6a de aŭgusto, kaj GOTENBURGO, Svedio, de la 6a ĝis la 9a de aŭgusto. Petu informojn kaj turismajn prospektojn de la respektivaj adresoj: Postkongreso, Hørmarksalle 5, DK-8240 RISSKOV-Aarhus, Danlando / Postkongreso, Box 55028, S-400 53 GOTENBURGO, Svedio.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo), turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Francio, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1 000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 IIR, Rotterdam-3002, Nederlando.

**SOMERAJ KULTURAJ ARANĜOJ
EN LA ESPERANTISTA KULTURDOMO
KASTELO GRÉSILLON, F-49150 Baugé,
Francujo. Poŝtkonto: Nantes 1485 39.**

Unua periodo: ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ
de la 1-a ĝis la 21a de julio 1975:

Kursoj trigradaj. Flankaj aktivaĵoj. Ekzamenoj.
Promenadoj. Ekskursoj. Distraj vesperoj.

Dum la du lastaj semajnoj de tiu periodo: 7a ĝis la
21a de julio, anoj de la Grupo de Esperantistaj
Edukistoj kaj de la Freinet-movado partoprenos la
diversajn aranĝojn kaj okazigos pedagogiajn rondojn.
Ege riĉa programo! Du hungaraj gekolegoj, Jozsef
kaj Helena Mikul'as estas invititaj.

Dua periodo: INTERNACIAJ SEMAJNOJ
de la 22a de julio ĝis la 11a de aŭgusto 1975:

Diverstemaj prelegoj, el kiuj pri: ISLAMO, filozofio,
kutimoj, ktp. (s-ro Lloancy); PEDAGOGIA TEMO
(s-ro Boyet); "KIA KRIZO TRAFAS NUN LA
TERAN MONDON" (s-ro Boyet); "PLENA REGU-
LECO DE ESPERANTO" (s-ro Luis Mimó); okaze
de la Internacia Jaro de Virino — "LA VIRINO KAJ
LA MASINO" (s-ino Cheverry) kaj aliaj . . .

Posttagmezaj flankokupoj. Debatoj pri la matenaj
temoj. Ekskursoj, Gajaj vesperoj.

Tria periodo: STUDSEMAJNOJ
de la 12a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro:

Trigradaj kursoj. Diversaj man-faradoj kaj distraĵoj
kiel dum la unua periodo.

Informoj kaj aliĝoj je la ĉi-supra adreso.

Retoriko restas ĉefverko


Nur lernolibroj
kaj vortaroj spertas
plurajn eldonojn.

RETORIKO
estas escepto:
ĝi jam aperis
EN TRI ELDONOJ!

Mendu ĉe UEA: 25,-
(por Nederl. 26,-) gld.
plus sendokostoj 10%.

"En ne multaj naciaj literaturoj estas trovebla
libro tiel science redaktita, tiel oportune
utiligebla, tiel pense riĉiga, kiel ĉi tiu verko."

Prof. G.Waringhien



TUTMONDAJ INFANOJ (6 ĝis 14 jaroj)! La Urbeŝtaro
kaj Centro de Esperanto, Santa Colona de Gramanet in-
vitas partopreni la 3an Int. Ekspozicion-Konkurson de
pentraĵoj pri libera temo (akvareloj, minimume 25x25cm),
limdato — la 31a de julio 1975. Sendu al: C.E.Puiscastel-
lar, Esperanto, Avda Ansalmo 79, Santa Colona de Gra-
manet (Barcelona), Hispanio. Informoj ĉe la sama adreso.



En 5 monatoj 600 venditaj ekzempleroj !

En mondo de nestabilaj valoroj, kie kvalito estas
oferata al kvanto, maloftaj estas la aĉetaĵoj, kies
valoro kreskas de jaro al jaro kaj kies apero
videble ŝuldiĝas al grandega homa fortostreĉo.
Sed tia estas la verko "Esperanto en Perspektivo":
monumenta kompendio de la Esperantaj movado
kaj kulturo tra 87-jara ekzistado — kaj, perspek-
tive, en la estontecon. Sur ĝiaj 876 paĝoj troviĝas
praktike ĉiuj scioj, kiujn povas bezoni la uzanto
de la Internacia Lingvo, inkluzive de multaj faktoj
neniam antaŭe publikigitaj.

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj
Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj.
Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroŝervo de UEA.

Havu mirindan kongreson en Kopenhago



La mirinda Kopenhago donas abundajn respondojn al la demando: "Kion ni faru, kiam ni finos la diskutojn?"

Tage — la listo de vidindaĵoj estas tre longa: ekde renesancaj palacoj ĝis la plej longa butikstrato de la mondo. Ekde unikaj skandinaviaj modernaĵoj ĝis la renome ekstravagancaj nefermitaj danaj sandviĉoj.

Nokte — estas restoracioj kun komuna kantado, kabaredaĵoj, amiketosaj trinkejoj, elegantaj noktokluboj, teatroj, la Reĝa Dana Baledo kaj cirko.

Plus la fakto, ke oni facile ekskursas en ankoraŭ unu landon, ĉar al Svedio per akvoglisilo daŭras nur tridekon da minutoj.

Atingi Kopenhagon estas same facile, kiel diri "SAS".

La dana ĉefurbo estas la nabo de la mondampleksa reto de SAS, al kiu konverĝas flugoj el Norda kaj Suda Ameriko, Proksima kaj Malproksima Oriento, Sudorienta Azio, Afriko kaj ĉiuj pli gravaj eŭropaj urboj.

SAS — pli ol simple sidloko

Skandinavia Aerlinia Sistemo,
oficiala flugkompanio de la
60a Universala Kongreso

SAS
SCANDINAVIAN AIRLINES